



ELDONO DE RUSIA ESPERANTISTA UNIO (REU)
№ 110, januaro 2020

Regiona agado

Novojarsk-2020, Barnaul



Kiel vi kutime renkontas Novan Jaron kaj pasigas la novjarajn feriojn? Ĉu vi ŝatus fari tion interese, gaje kaj inter esperantistoj? Siberiaj esperantistoj faras tion jam la kvinan fojon. Jes, temas pri — jam tradicia — novjara renkontiĝo de siberiaj esperantistoj — Novojarsk'. Ĝi okazas ĉiufoje en alia siberia urbo, kaj nun estis la unua fojo, kiam la feston gastigis Barnaul. Antaŭe ni renkontiĝis en Krasnojarsk, Tomsk, Novosibirsk... Sed, kompreneble, ne nur siberianoj rajtas veni kaj partopreni! Unuavice, Novojarsk' estas renkontiĝo de amikoj. Kaj jen ĉi-foje, krom siberianoj, al ni venis gastoj el urbo Vladimir, el Moskva regiono, kaj eĉ el Kazahio!

Kiel estas dirite, Barnaul gastigis la feston la unuan fojon. Do certe, ĉi-jaraj organizantoj havis multajn zorgojn kaj klopodojn. Sed spertaj organizintoj de antaŭaj Novojarskoj tre bone helpis, kaj ĉio pasis bone. La popolo estis kontenta — kaj tio plej gravas!

Pri kio do ni okupiĝis?

La 31-an de decembro, antaŭ la oficiala malfermo, ni promenis en la pina arbaro eksterurbe. La festo ja estas novjara, vintra, kaj ĉiuj gastoj kaj lokanoj spertis tion. Estis multe da neĝo, freŝa aero kaj gaja etoso. Poste estis planata la interkona vespero, sed la arbara promeno fakte

prenis al si tiun rolon.

Vespere okazis registriĝo de l' partoprenantoj kaj la oficiala malfermo de Novojarsko. Nu, eĉ estante oficiala, ĝi tamen estis gaja kaj amiketosa. Ĉiuj kluboj de diversaj urboj prezentis sin, kaj subite (subite por la lokanoj, certe) faris multajn donacojn al la barnaula Esperanto-klubo «Oazo» — kiel al la organizantoj kaj gastigantoj.

Kaj poste komenciĝis la bankedo... Adiaŭo de la foriranta Malnova Jaro kaj renkonto de la Nova. Certe, kun Avo Frosto, kun konkursoj, ŝercoj kaj aliaj distraĵoj. Kaj kun nepra nokta promeno al la urba Novjara Abio. Post la reveno la festeno daŭris... neniuj povas diri certe ĝis kioma horo — sed eble ĝuste tio ja estas la signo de ĝia sukceso!

La 1-an de januaro, post matena ripozo, ni denove promenis al la Novjara Abio, glitis desur la montetoj, fotiĝis ktp... Post la reveno estis organizita interpretista konkurso, kaj post la vespermanĝo — koncerto de karaokeaj kantoj. Vespere — ne nur la 1-an de januaro, sed ĉiuvespere — nin atendis ludoj surtablaj, ludoj-ridigiloj, «Homlupoj», kvizoj, preferanco, amika babilado kaj eĉ lecionoj de jonglado!

Sekvan tagon ni havis busan ekskurson tra la urbo kun profesia ĉiĉerono, kiu tre interese rakontis pri historio de Barnaulo, pri ĝia apero kaj evoluo, pri vidindaĵoj kaj memorlokoj. Eĉ la lokanoj ne sciis ĉiujn faktojn el la rakonto! Haltoj kaj promenoj aldonis specialan percepton de la ekskurso.



Posttagmeze ni vizitis muzeon «Mir vremeni», kiu havas apartan ekspozicion pri Esperanto. Tie, en la muzeo, «la malnova gvardio» de la barnaula E-klubo rakontis al la gastoj pri la historio de «Oazo» kaj entute pri Esperanto en Barnaulo. Grava parto de la programo estis rakonto de Anatolo Gončarov, kiu mem bedaŭrinde ne povis partopreni Novojarskon, sed sendis la registraĵon. Interalie, la renkontiĝon en la muzeo filmis la loka televido, kiu poste faris du mallongajn elsendojn. Krome, en la loka gazetaro aperis artikolo pri Novojarsk', kaj eĉ ĵurnalisto de radio «Majak» venis (alian tagon) por fari propran intervjuon.

Post la muzeo ni ĉiuj iris al Teatro de Dramo. Novojarsk' havas siajn proprajn tradiciojn, kaj vizito de teatro estas unu el ili.

Post la vespermanĝo okazis interesa leciono pri tataraj vortoj en la rusa lingvo, ludo «Naduvaločka» kaj aliaj ĉiuvesperaj ludoj kaj distraĵoj.

La 3-an de januaro ni vekigis frue kaj busveturis al vilaĝo Polkovnikovo, kie troviĝas muzeo de kosmonaŭtiko, portanta nomon de la dua kosmonaŭto en la mondo — German Titov. En la muzeo funkcias ekspozicio, dediĉita al la patro de la kosmonaŭto — S. P. Titov, kiu estis fama pedagogo kaj esperantisto. Tuta ĉambro en la muzeo estas plene dediĉita al Esperanto.

Post la reveno estis organizita serioza parto de la programo — seminario "Kiel evoluigi kaj plibonigi la agadon de UEA" (surbaze de kontribuoj de Renato Corsetti, Carlo Minnaja, Ian Fantom kaj aliaj famaj esperantistoj). Kaj poste — pridiskuto de la temo «Ĉu ekzistas problemoj de denaskaj esperantistoj?». Ja, krom plenkreskuloj, Novojarskon partoprenis ankaŭ infanoj — 6-, 11- 15-jaraj, epizode nin vizitadis 5-jara denaskulino kaj povus (se permesus la cirkonstancoj) ankoraŭ unu 9-jarulo. Krome, ĉeestis ankaŭ plenkreskaj denaskuloj. Do, la temo estis grava kaj aktuala.

Vespere nin atendis distra programo — barda rondo, kaj poste denove ludoj kaj babilado.

Sekvan tagon ni vizitis grandan Altajan regionografian muzeon kaj poste — muzeon «Mir kamnja». Feliĉe, en la lasta ĉeestis mem la organizinto de la muzeo, kaj li prezentis al ni intereseĝan rakonton pri la mondo de ŝtonoj.

Posttagmeze denove estis seriozaj programeroj — rakonto pri projekto «Unu leciono de Esperanto por ĉiu lernanto» fare de Irina Gončarova, kaj diskuto kun la prezidanto de REU Aleksandr Lebedev.

Kaj vespere okazis la adiaŭa komuna koncerto, kie ĉiu povus prezenti iun programeron laŭplaĉe kaj laŭdezire; ĝi finiĝis per bela kanto, dediĉita al Novojarsko kaj al Barnaulo, kaj transformiĝis al teumado kaj poste — al la «adiaŭa rondo» — ankoraŭ unu tradicio, eĉ ne Novojarska, sed de la bonaj malnovaj tempoj de SEJM.

La 5-a de januaro estis la lasta tago, pli ĝuste — duontago. Parto de la partoprenintoj forveturis frumatene, la aliaj partoprenis ankoraŭ unu programeron — diskutrondon «La vojo al forta espero», kies ĉefa temo estis praktika uzado de Esperanto ne nur (kaj ne tiom) kiel lingvo, sed kiel komunumo kaj samideanaro, en kiu ĉiu membro povus ricevi helpon de aliaj anoj laŭbezzone, en kiu ni ĉiuj povus subteni unu la alian kaj kune okupiĝi eĉ pri ekster- kaj ne-esperantaj aferoj.

Oficiala fermo de Novojarsk' (kun fiksado de la rezultoj, impresoj, statistiko ktp) estis planita, sed ne okazis. La praktiko montris, ke tute sufiĉis la neoficiala — la komuna adiaŭa vespero. La statistiko estis poste publikigita en la VK-grupo de la festo — <https://vk.com/novojarsk2020> (tie vi povas vidi ankaŭ la fotojn), la impresoj estis skribitaj de ĉiu partopreninto en specialan memor-kajeron de la barnaula klubo. Kaj la rezultoj... kiel ni diris en la komenco — la popolo restis kontenta, al homoj plaĉis, kaj ĉiuj estas entuziasmaj pri la sekva Novojarsko. Kie ĝi okazos? Ĉu en Novosibirsko, ĉu en Novokuznecko, ĉu ie aliloke? Ni decidis. Sed certe ie en Siberio. Venu al ni — ne nur siberianoj. Ni renkontu la Novan Jaron kune!

Ikar' A.

Impresoj pri Novojarsko en Barnaulo



Jam la kvaran fojon mi partoprenas novan por mi Esperanto-aranĝon. Ne, iam estis novjaraj renkontiĝoj en Siberio, sed ili estis alistilaj kaj, kiel mi memoras, sen daŭriĝoj. Almenaŭ tiel mi memoras. Kio min impresas — kultur-konata karaktero de la renkontiĝo, estas klare — ne tiom multe da tempo kaj eĉ organizantoj devas iomete ripozi ;-)

Grupo de tomskanoj elvagniĝis meze de nokto, estis nekutime milda vetero por siberia vintro: -5 -7. Decidis iri per piedoj rifuzinte taksion — rusiaj civitanoj ĝis proksima gastejo per taksio ne veturadas... Efektive, la vojo estis amuza, oni bone iluminis diversajn artobjektojn. Iom misvojiĝis neĝuste interpretante turniĝantan mapon en 2Gis, tamen ~ post 40 min trovis la gastejon. Enlasis nin malgraŭ profunda nokto...

La gastejo estas nova kaj poste evidentiĝis — sufiĉe oportuna, krom esperantistoj tie estis neniuj, tio estas pluso. Krome, en la unua etaĝo estis granda halo ~ 40-50 homoj kaj kafejo, do neniuj problemoj pri manĝado.

Oficiala malfermo okazis tre mafrue — por krasnojarskanoj trafi Barnaulon ne estas facile, siberiaj distancoj kaj maloportunaj trajnaj itineroj... Ĝis tio dezirantoj promenis, konatiĝis iomete kun la urbo. Mi mem ofte preterveturis ĝin, eĉ dufoje estis por mallonga tempo, tamen restis neniuj impresoj kaj pli-malpli tuteca bildo pro la urbo.

Tamen tempo kuras, malnova jaro (laŭ gregoria kalendaro! ;-)) kalkulis lastajn horetajn kaj minutojn. Bunta kompanio sidiĝis al festa tablo, tostoĵ, bondeziroj k.a., ho, FrostAvo venis! kio donis aldonan gajecon. Specialistoj klopodis organizi brodkaston de la festa parolo de la prezidento de Rusio, sed... kiel dum antaŭaj renkontiĝoj nenio rezultis, tamen post nelonga diskuto kies horloĝo montras pli ĝustan tempon, levis glasojn, ĉu kun ĉampano, ĉu kun vino, aŭ eĉ kun «Tajga donaco» (tsss!, inter ni estis infanoj kaj alkoholmaldezirantoj) kaj LAŬTE renkontis Novan, 2020 jaron! (laŭ gregoria kalendaro! ;-)). La tablon priservis kafejaj laborantoj, la regalo estis bongusta kaj abunda. Por iom malpufigi la stomakojn, la kompanio iris promeni ĝis centra abio. En la parko tumultis popolo, espoj provis organizi rondancon ĉirkaŭ abio, ĉu la abio estis granda, ĉu el popolo aliĝis ne multe, tamen rondo preskaŭ ne okazis kaj post 2 turnoj disfalis. Tamen estis gaje! Post reveno al la gastejo la plej eltenemaj eĉ sukcesis renkonti NJ laŭ moskva tempo! (+4!)

Kiu tago en jaro estas plej mallonga? Nu certe, la unua de januaro! Post malfruega vekiĝo, promenoj laŭ plenneĝa urbo, taga urbo sen lumigo estas iom vintre griza. Vespere estis diversaj ludoj. Estis tre gaje kaj amuze!

Post plej kurta tago en jaro, la urbo komencis aktivi, ankaŭ nia programo akceliĝis: busa ekskurso laŭ la urbo, dum kiu mi eksciis multe da novaj faktoj. Poste espoj plenigis muzeon «Mir vremeni» („Mondo de pasinto”) — estis rakonto pri E-klubo «Oazo» kiu jam atingis tre estimindan aĝon — 55 jarojn!!! Longe aŭskultis vortorenon de A. Gonĉarov, kiu sendis aŭdmesaĝon. Poste iomete rigardis esperantan ekspozicion kaj aliajn artefaktojn el tempoj de eksUSSR. Estis vere interese! Post muzeo ni kuris al spektaklo «Provincaj anekdotoj», aktoroj ludis bone, malgraŭ eksteraje malserioza aspekto, A. Vampilov povis plekti tiel, ke spektantoj povis



neatendite malkovri por si mem profundajn aludojn pri homaj interrilatoj.

Kaj vespere — varia distra programo.

La 03.01. ni veturis al muzeo de kosmonaŭtiko de German Titov. Lia patro S.P. Titov estis instruisto, varie talenta homo kaj esperantisto. Mem la muzeo estas tre moderna kaj interesa. Estis aparta ekspozicio dediĉita al la patro pri lia esperantisteco. Poste iris al tre modesta domo-muzeo de familio Titov.

Post reveno estis aro de esperantistaj programeroj, inter ili — «Ĉu ekzistas problemoj de denaskaj esperantistoj?» kiu vekis viglan interŝanĝon de opinioj kaj eĉ spertoj prie. Des pli, en Barnaul estas la plej granda denseco de denaskaj esperantistoj!

Vespere estis barda rondo, kie gitaro „vagadis—inter Evelina kaj Rustam, Elena Birjukova, Sergeo Ĵilejkin, harmonikis V.

Solovjov... Kiuj ne povis majstri gitaron — kunkantis!

La sekva tago dum la unua duono estis dediĉita al regionografia muzeo kaj muzeo de ŝtono. Rakonti prie — estas tutsame kiel rakonti pri gusto de ŝaŝliko ;-)

Dua duono estis dediĉita al esperantistaj temoj: «Unu leciono de E-to por lernejanjoj» kaj „La prezidanto de REU respondas—

Adiaŭan komunan koncerton kompilis kaj majstre gvidis Evelina Sokolova. Estis gaje kaj iom triste — ja baldaŭ ni disveturos al nia ĉiutagec!...



Dum la lasta tago, iom maldensiginta pro jam forveturintoj, estis konferenco «La vojo al forta espero» kiun iniciatis Mihail Ĥromov, kiu proponis organizi kooperativan kunagadon de siberiaj esperantistoj. Laŭ mi, la temo de komerca kunagado inter esperantistoj, ree kaj ree leviĝas, tamen „komerca kunagado—estas „glita vojo—de unu flanko, de alia — Esperanto-agado estas sen firma ekonomika bazo, ĉu pro tio E-movado estas sen firma financa tavolo sub «La Fundamento»?

La kvina «Novojarsk» pasis bone, grandparte pro sindediĉaj klopodoj de familio Akimenko, kontribuoj de „Oazo—anoj: Gennadij Jaskov, Viktoro Jakovlev, Valentina Kazanova, Sergeo Isakov k.a.

Estas tre bone, ke venis miaj malnovaj amikoj — Valerij Perikov (Novokuzneck), Slava Torbik (Barnaul), ili pro diversaj kaŭzoj nun estas ne tre vojaĝemaj, tamen esperas, ke la aranĝo povontus revenigi ilin al nia gaja kompani'!

Ho ve, ne povis veni E. Ŝaravina, G. Graĉova, Je. Arbekova... Sentebliis ilia foresto ;-)

Ĝis sekva «Novojarsk»! Ĝis sekva renkontiĝo en nova urbo, en nova festa etoso!

Geĉjo Basov /Tomsk-Stavropol

Jarkalendaro kiel fonto de inform-motivoj por popularigi Esperanton La 21a de februaro – Internacia tago de la gepatra lingvo



La 17an de novembro 1999 la 30a Ĝenerala konferenco de Unesko proklamis la Internacian tagon de la gepatra lingvo. Ĝi estas festata jam dum du jardekoj la 21an de februaro ekde la jaro 2000 kiel tago por apogado de lingva kaj kultura diversecoj kaj por protektado de minoritataj lingvoj.

Al kiu evento revenas ĉi tiu dato? En ĉi tiu tago en la jaro 1952 en Dako, nuntempe la ĉefurbo de Bangladeŝo, de policistoj estis pafmurditaj kelkaj universitataj studentoj, kiuj pace manifestaciis kaj kiuj nur volis, ke la bengala estu egalrajta ŝtata lingvo en la Orienta Pakistano. Bangladeŝo direktis al Unesko proponon pri establo de la Internacia tago de la gepatra lingvo omaĝe al la pereintaj studentoj, kaj la partoprenantoj de la Ĝenerala konferenco unuanime akceptis la decidon.

Lingvoj estas la plej potenca kaj efika instrumento por konservado kaj evoluigo de la kulturaj trezoroj, de la spirita kaj materia heredaĵoj de ĉiuj popoloj. La gepatraj lingvoj unikas pro tio, ke ili provizas homojn ekde ilia naskiĝo per aparta vidpercepto de la ĉirkaŭa mondo, kiu neniam malaperas eĉ se oni poste lernas aliajn lingvojn. Lerni fremdajn lingvojn signifas konatiĝon kaj alproprigon de aliaj ebloj de kognado. La diskonigado de gepatraj lingvoj premisas lingvan diversecon, multlingvan edukadon, alproprigon de lingvaj kaj kulturaj tradicioj de aliaj popoloj, plifirmigon de internaciaj solidareco kaj amikeco, plivastigon de interkompreno kaj toleremo, dialogon, forigantan interhomajn miskomprenojn kaj malkonfidon.

Kial ĉi tiu internacia festotago estas aparte atentata en la tutmonda esperantista komunumo? Oni povas trovi multajn respondojn al ĉi tiu demando, inter ili pli kernaj respondoj rilatas senpere al la demokratia karaktero de la tutmonda movado por Esperanto:

- esperantistoj respektas ĉiujn lingvaj rajtojn;
- esperantistoj estas por protektado de ĉiuj etnaj lingvoj, parolataj en la mondo;
- esperantistoj estas kontraŭ disigado de lingvoj je grandaj kaj malgrandaj, potencaj kaj minoritataj;
- esperantistoj estas kontraŭ socia kaj lingva maljusteco;
- esperantistoj estas por lingva justeco en la internacia interkomunikado;
- esperantistoj per la uzado de la internacia lingvo Esperanto praktike realigas lingvan egalrajtecon kaj helpas ĉiujn pluvivigi siajn gepatrajn lingvojn.

Universala Esperanto-Asocio estas neregistara organizaĵo, kiu dediĉas multan atenton al la demandoj kaj problemoj de lingvaj justeco kaj egaleco. Pri tio vi povas informiĝi, vizitante la retejon –Agado por lingvaj rajtoj en la mondo” <http://www.linguistic-rights.org/> Tie ĉi vi trovas respondon ankaŭ al la demando: –Kial ĝuste Esperanto?” La respondo atestas senescepte humanismajn trajtojn de la tutmonda esperantistaro en la aliroj rilate al la traktado de lingvaj problemoj: –Ĝa kialo estas simpla. Malantaŭ Esperanto ne estas ŝtatoj, ekonomiaj interesoj, imperiismaj strebadoj, nek popoloj, kies intereso estus la malaperigo de aliaj popoloj, ties lingvoj, aŭ akiro de iliaj merkatoj. Malantaŭ Esperanto estas nur bonvolaj homoj el plej diversaj popoloj, nacioj, kiuj celas justecon por ĉiuj kulturoj kaj ĉiuj lingvoj, en paco inter ĉiuj popoloj.”

Por esperantistoj ĉi tiu lingva festotago jam dum multaj jaroj estas konvena preteksto por sukcese kaj laŭeble vaste informi neesperantistan publikon pri Esperanto lige kun la menciita kunteksto, kiu pledas unuavice por respektado de lingvaj rajtoj kaj protektado de lingvoj inkluzive de la gepatraj.

Dum informkampanjoj estas nepre menciinda alia interesa kaj unika fakto, kiu pruvas komunikajn valorojn de Esperanto kaj prezentas ĝin kiel vere komunike realigitan lingvon. Esperanto estas jam delonge elprovita familia lingvo kaj gepatra lingvo por multaj denaskaj esperantistoj en la tuta mondo. Denaskaj Esperanto-parolantoj (aŭ denaskuloj) estas homoj, kiuj de siaj gepatroj aŭ alifamilianoj-esperantistoj alproprigas Esperanton kiel unu el familiaj lingvoj. Ordinare tiaj infanoj fariĝas denaske dulingvaj, trilingvaj aŭ eĉ pli plurlingvaj. La blogo –Denaskuloj” en 2019 nombris entute ĉirkaŭ 2000 denaskajn Esperanto-parolantojn en la tuta mondo. La aktuala vikipedia listo de denaskaj esperantistoj konsistas el iom pli ol 30 denaskuloj, kiuj meritas aŭ jam havas artikolon en la Vikipedio. Inter ili estas menciitaj du denaskaj esperantistoj el Rusio. Pli detalajn kaj multajn interesajn informojn vi povas trovi ĉe https://eo.wikipedia.org/wiki/Denaskaj_Esperanto-parolantoj



24. – 29. februaro 2020
Semajno de Internacia amikeco



Semajno de Internacia amikeco estis iniciatita en 1968 de Erik Carlén, sveda Esperanta aktivulo kaj tiama vicprezidanto de UEA, por plifortigi reciprokajn kontaktojn inter esperantistoj. Sian ideon li esprimis per la vortoj, kiuj aktualas ankaŭ nun: "Ni ekbruligu la flamon de amikeco trans limoj. Ĝia lumo signifas justecon, fratecon, pacon inter homoj kaj popoloj. Kaj por ke tiu flamo povu lumi pli klare en la mondo, ni laboras por la disvastigo de la neŭtrala internacia lingvo Esperanto. En la servo de la nobla tuthomara kulturo ĝi vivu, floru kaj eligu la lumon de amikeco trans limoj." Tradicie SIA estas okazigata ĉiujare en la lasta semajno de februaro. En 2020 ĝiaj kalendaraj tagoj estas la 24a – 29a de februaro. Unuafoje la Semajno estis aranĝita en 1969 kaj rezulte de la kelkjardeka historio ĝi atingis pasintjare la jubilean nombron jam de 50 okazigitaj semajnoj!

Erik Carlén lanĉis kaj sukcesigis la aferon en la antaŭinterreta epoko de tradicia poŝto, kaj tiam diverslandaj esperantistoj volonte kaj amase interŝanĝadis salutleterojn, poŝtkartojn, librojn, diversajn esperantaĵojn, donacetojn, kolektante riĉajn aŭtentajn kaj ekskluzive interesajn materialojn por informaj prelegoj pri Esperanto al neesperantista publiko, por ekspozicioj, muzeoj, informstandoj, afiŝoj, klubkunvenoj, gazetaj artikoloj, bibliotekaj eksponaĵoj ktp. En 1986 Erik Carlén inspiris alvoko la tutmondan esperantistaron: "Memoru viajn amikojn en ...ujo kaj eksterlande, sendu al ili dum la Semajno saluton (uzu amikokarton), donacon, ekz. libron, skatolon de ĉokolado aŭ florojn. Afableco naskas amikecon. Amikeco faras la vivon pli riĉa, tial kulturu ĝin. Jen vi havas okazon." Tiu ĉi internacia agosemajno havas propran emblemon: du interpremiĝantaj manoj sub la kvinpinta stelo kaj la subskribo "Amikeco trans limoj". SIA estis kaj restas dum pluraj jardekoj populara evento en la medio de esperantistoj, ĉar ĝi instigas diverslandajn klubojn kaj societojn al internaciaj kontaktoj kaj novaj amikecaj ligoj, ĝin aktive partoprenas ankaŭ izolite loĝantaj esperantistoj, kies kontaktebloj kaj agadkampoj pro objektivaj kaŭzoj estas limigitaj.




En la lastaj jardekoj, kiam danke al la interreto korespondaj ligoj de esperantistoj tra la tuta mondo fariĝis rutina afero, ebliganta rapidajn kaj tujajn teknike variajn kaj altkvalitajn kontaktojn inter komputiluzantoj, rimarkeble malpliigis intereso pri la uzado de ordinaraj paperpoŝtaj servoj, kaj tio ĉi damaĝis la iaman amasan karakteron de SIA. Sed feliĉe la retaj ligoj neniel povas aboli la originan ideon de la Semajno: flegi la lumon de amikeco trans ŝtataj limoj.

En la nuna teknologia epoko, kiu kaŭzas multajn avantaĝojn por komunikado, esperantistoj povas pli intense interkontakti kaj ĝui amikajn interrilatojn, tute ne forgesante la tradiciajn poŝtajn servojn, sin apogi fekunde al novaj modernaj formoj de kunagado: paĝaroj, personaj retpaĝoj kaj blogoj, grupoj en sociaj retoj, diskutforumoj, dissendolistoj, internaciaj aktivaĵoj, bitgazetoj ktp. Ne malgrava montriĝas alia agadflanko, kiu rezultas el aktivecoj kadre de la Semajno: informi neesperantistojn pri komunikaj valoroj de Esperanto, emfazi ĝian sukcesan rolon de la elprovita helplingvo, aktive uzata por plifirmigo de pacaj kaj amikecaj internaciaj ligoj. Tiu ĉi informa branĉo, realigebla tra la prismo de la popularigo de Esperanto por konkretaj celgrupoj, disponigas multajn atentindajn formojn kaj tute ne postulas iajn eksterordinarajn elspezojn de fortoj kaj tempo.

Vladimir Opletajev

Festoj



Verda lumo

La 23-n de januaro oni festas tre interesan tagon. Certe la nekutima festo de la Verda lumo ne havas oficialan signifon, sed tutegale ĝi estas multloke festata. Ne ekzistas fidinda informo pri tio, kiel aperis tiu festo, sed atente esplorante historion, eblas rimarki, ke la verda koloro havas grandan signifon en multaj religioj kaj ĉe multaj popoloj. Verda estas la ĉefa koloro ankaŭ de Tago de la Sankta Patriko. Psikologoj agnoskas la verdan koloron kiel kvietigan kaj malstreĉigan. Ankaŭ por esperantistoj de la tuta mondo verda koloro estas tre grava, ĉar ĝi

simbolas esperon pri la paca kaj bela vivo sur la planedo.

En la kompreno de multaj homoj verda koloro asociiĝas kun la lumo de semaforo kaj estas sinonimo de la kompreno de permeso. Oni eĉ rekomendas por liberiĝi de misfortuno kaj de la vivproblemoj ĉirkaŭi sin per verdaj objektoj kaj eki al sia celo. Kial bezonatas verdkoloraj aĵoj? Ĉar homo kutimas percepti la verdan koloron kiel permeson ion fari. Kiam oni diras "verda lumo", ĉiuj tuj pensas pri semaforo, pri tio, ke eblas iri, ne timante iun danĝeron.

Se vi iam volis rekomenci la vivon de nulo aŭ almenaŭ iom ŝanĝi ion en sia vivo, ekokupiĝi pri iu interesa projekto aŭ iu alloga afero, eklerni ion novan, komenci zorgi pri vi mem kaj pri via sano – tiu tago estas la plej bona por tiuj aferoj! Hodiaŭ verdan lumon havas ĉiu! Ĉiuj vojoj estas malfermitaj kaj ĉiuj semaforoj montras la verdan lumon! Ĝi akompanu vin je ajna elektita de vi vojo!

Raja Kudrjavceva

Ret-konekto dum Esperanto-aranĝoj

Tio estas notico-alvoko al organizantoj de diversaj Esperanto-aranĝoj pri anticipa diskonigo de informo pri lokaj kondiĉoj rilate ĉel-telefonion, ĉel-interreton, vifion.

Ĉel-telefonio

Por partoprenantoj de aranĝoj gravas, ke iliaj poŝtelefonoj stabile funkcii kaj povu fari kaj akcepti vokojn kaj SMS-ojn. Pro tio tre dezirindas mencii en informletoj pri aranĝoj: kiuj ĉel-operatoroj funkcias surloke, ĉu stabile aŭ ne. En urboj apetaŭ estos problemoj, tamen en foraj ripozbasejoj, ekzemple en arbaroj, montaroj k. t. p. povas funkcii ne ĉiuj operatoroj el «granda kvaropo» (MTS, Bilajn, Megafon, Tele2). Se sciigi homojn pri tio anticipa, ili mem zorgos havi en la telefono SIM-karton de ĝusta firmao, kiu funkcias surloke.

Ĉel-interreto kaj vifio

En moderna mondo dum renkontiĝoj, kongresoj, konferencoj dezirindas havi stabilan interreton. Ĝin povas bezoni kaj program-kontribuantoj por eventuale uzi dum prelegoj, kaj ordinaraj partoprenantoj por retumi. Nuntempe fakte temas nur pri sendrata retkonekto (pri la drata mi eĉ ne certas, ĉu mi iam ajn uzis ĝin eksterhejme...), do pri du ebloj: ĉel-interreto kaj vifio.

Per vifio partoprenantojn kutime provizas bazejoj senpage. La tasko de organizantoj de aranĝoj estas kontroli la kvaliton de tiu vifio kaj publikigi la informon en informletoj pri aranĝoj:

- ĉu ĝi funkcias sur la tuta teritorio de la bazejo aŭ nur en iuj specialaj ĉambroj;
- ĉu la signalo estas forta, ĉu la konekto ne malaperas ĉiuminute;
- kiom rapida ĝi estas.

Per ĉel-interreto homojn provizas ĉel-operatoroj kontraŭ pago. Tamen nuntempe ĝi ne estas tro granda, do se surloke funkcias aĉa vifio kaj normala ĉel-interreto, multaj uzados la lastan. La tasko de organizantoj estas esplori kvaliton de ĉel-interreto surloke laŭeble por ĉiu el la ĉefaj ĉel-operatoroj (MTS, Bilajn, Megafon, Tele2) kaj publikigi la informon en informletoj pri aranĝoj:


- ĉu la ĉel-operatoro ĝenerale liveras ĉel-interreton en tiu loko;
- kiu speco de la interreto estas liverata (GPRS, EDGE, UMTS, LTE);
- ĉu la signalo estas forta, ĉu la konekto ne malaperas ĉiuminute;
- kiom rapida estas la konekto.

Pri rapideco indas mencii konkretan valoron (1 Mb/s, 5 Mb/s, 20 Mb/s, k. t. p.), sed ne nur sian pritakson. La valoron eblas ricevi, mezurinte la rapidecon (sendepende, ĉu temas pri vifio aŭ pri ĉel-interreto) per ajna el poŝtelefonaj aplikaj-interretmezuriloj, kiuj multas.

Ekzemple «Speedtest», per kies ekrankopio estas ilustrita tiu ĉi notico.

Jen tre proksimumaj ekzemploj de rapideco por kelkaj kutimaj celoj:

- por normala minimume komforta funkciado de interreto kun eblo uzi retroŝton, sociajn retojn, skajpon por teksta kaj voĉa babilado, ordinarajn paĝarojn — devas esti almenaŭ 1 Mb/s;
- por spekti en normala kvalito videojn aŭ fari per skajpo video-konferencojn — almenaŭ 5 Mb/s.



Aleksandr Lebedev

Historio

Honortabulo. Rusiaj Esperantistoj de la jaro

Antaŭ monato Mikaelo Bronŝtejn estis proklamita Esperantisto de la jaro 2019 laŭ la versio de REU. Oni povus interalie demandi: kiuj personoj ricevis tiun honoran titolon antaŭe? Se estas tradicia honorigo, do kiom longa estas la tradicio? Kiam ĝi estis lanĉita kaj ĉu ekzistis io simila antaŭe? La demando estas interesa el la vidpunkto de la historio de la rusia Esperanto-movado, kaj krome ĝi gravas ankaŭ el la vidpunkto de prestiĝo de tiu ĉi gratifiko — ja estas ĝojige trafi en unu vicon kun aliaj bravuloj, se scii, kiom granda estas la listo kaj kiuj jam staras tie.

Demando pri la historio de «Esperantisto de la jaro laŭ la versio de REU» aperis ĉe Aleksandr Lebedev dum pridiskuto de la kandidatoj por la jaro 2019 en la dissendolisto de la Estraro. La memoro pri la laŭreatoj de la lastaj jaroj estis freŝa: Vladimir Sapojnikov, Raja Kudrjavceva, Jefim Zajdman. Aliaj estraranoj aldone rememoris pri Viktoro Aroloviĉ, Anatolo Ivasenko, Garik Kokolija, Aleksandr Blinov, sed sen preciza ordo kaj jaroj de la laŭreatiĝoj. Por precizigi la datumojn, estis farita demando al Viktoro Aroloviĉ, komisiito pri dokumentaro.

Viktoro, serĉante la informon, trafolumis la multjaran kolekton de «REGo». Troviĝis la jeno.

«Aktivulo 2000»

La plej frua tiuspeca nomumo okazis por la jaro 2000: antaŭ la aranĝo REK-EoLA (marto 2001) estis reta voĉdonado de REU-funkciuloj por la titolo «Aktivulo 2000». Gajnintoj estis pluraj kaj eĉ dividitaj je du kategorioj.

➤ En la kategorio «Progreso de la movado»:

- o **Jurij Karcev** — «pro okazigo de „etaj eldonoj— (ĵ)ntaroj, „Legu aktivulo—vortaretoj) kaj Bokarev-vortaro»,
- o **Garik Kokolija** — «pro funkciigo de nova E-revuo REGo kaj eldonado de ties unuaj numeroj»,
- o **Nikolaj Gudskov** — «pro okazigo de SAT-kongreso en Moskvo, pro libro pri Esperanto, gvidlibro pri Moskvo, elsendoj en la tutrusia televido»,
- o **Irina Gonĉarova** — «pro la funkciigo de E-movado en Roslavl, pro novtipa StRIGo, pro nova instrumentado „Faru la rondon— kaj aliaj atingoj»,

PONTO n-ro 110, januaro 2020

- o **Gennadij Basov** — «pro la refunkciigo de OrSEJT».
- En la kategorio «Stabila agado»:
- o **Aleksander Korĵenkov kaj Halina Gorecka** — «pro la eldonado de „La Ondo de Esperanto»».
- o **Jurij Finkel** — «pro interreta agado: ttt-ejo <www.Esperanto.mv.ru>».
- o **Junulara E-Asocio de Ĉuvaŝa Respubliko** — «pro la Lingvaj Festivaloj».

La publikajo pri la nomumo aperas en «REGo» en la parto «Bulteno de REU» (*REU nomumis la «AKTIVULOJN de la jaro 2000»*. // «Bulteno de REU». — 2001. — №4 aprilo. — p. 2. // «Rusia Esperanto-gazeto». — 2001. — №2 (4) aprilo. — p. 18.)

La informo ne mencias preferordon interne de la kategorioj, sed sur la sola apuda foto troviĝas Jurij Karcev.

Estis nenia aludo, ke la iniciato iĝos tradicia, tamen...

Subkategorio ene de «Atingoj de la jaro»

Decembre 2001 dum REK okazis voĉdonado pri «Atingoj de la Jaro en Rusia E-movado» en 5 kategorioj, unu el kiuj estis «**Rusia Esperantisto — 2001**». Laŭreatoj eatis 1. Garik Kokolija, 2. Irina Gonĉarova, 3. Oleg Izjumenko. Ĉu la numeroj signifas preferordon? Ne klaras. Sur la foto en «REGo» troviĝas la tuta triopo («*Rusia Esperanto-gazeto*». — 2002. — №1 (8) januaro. — kovrilfolio, interne). Interese, ke ĉi-foje la informo aperis interne de la «REGo»-kovrilo, ne en la «Bulteno de REU».

Ankoraŭ trifoje samspecaj voĉdonadoj okazis dum REK-oj en sekvaj jaroj.

Decembre 2002 laŭreatiĝis en la kategorio «**Rusia Esperantisto — 2002**» 1. Vjaĉeslav Ivanov, 2. Andrej Grigorjevskij, 3. Nikolaj Gudskov. En «REGo» oni donas apude nur foton de Slavik («*Rusia Esperanto-gazeto*». — 2002. — №6 (13) decembro. — kovrilfolio, interne).

Februare 2004 rezulte de simila voĉdonado kiel «**Rusia Esperantisto — 2003**» estis elektita la sola Viktor Kudrjavcev («*Rusia Esperanto-gazeto*». — 2004. — №2 (21) aprilo. — kovrilfolio, interne).

Fine, maje 2005 rezulte de voĉdonado kiel «**Rusia Esperantisto — 2004**» laŭreatiĝis 1. Aleksandr Melnikov, 2. Vitalij Malenko, 3. Vladimir Samodaj. La koncernan informon en «REGo» akompanas la foto de A. Melnikov unuope («*Rusia Esperanto-gazeto*». — 2005. — №3 (28) junio. — kovrilfolio, interne).

Aleksandr Lebedev paralele trarigardis la arĥivon de la Estrara dissendolisto kaj inter malnovaj leteroj trovis menciojn pri du lastaj el tiuj voĉdonadoj (pri la atingoj de la jaroj 2003 kaj 2004). Krome, pri «Atingoj de la Jaro 2004» troviĝis temo en la forumo E-novosti — <http://www.e-novosti.info/forumo/mondo/topic1769.html>, kie Slavik Ivanov faras supozojn: pro kio estis distingitaj ĝuste tiuj personoj. Tamen «oficialaj» klarigoj pri la temo mankas. En «REGo» oni nur donas nomojn de la honorigataj homoj sen iuj ajn komentoj.

Por la jaroj 2005–2009 ni trovas neniujn menciojn pri aljuĝo de similaj honortitoloj.

REU-premio

En la jaro 2010 la Estraro de REU enkondukas ĉiujarfinan REU-premion, antaŭvidante eblon distingi 1 aŭ 2 personojn. Ĝi nomiĝis simple «REU-premio» sen iu titolo en la stilo «Rusia Esperantisto — [jaro]» aŭ simila. Ni citu ĉi tie la koncernan tekston:

«La Estraro de Rusia Esperantista Unio lanĉas ĉiujarfinan REU-premion. Ĝin ricevos rusiaj esperantistoj, kiuj havas apartajn meritojn antaŭ la landa movado, do temas ne nur pri aktivado en/por REU.

Post ioma diskuto la Estraro decidis, ke la premio ne estos mona (bedaŭrinde REU ne estas sufiĉe riĉa por enmanigi solidan premion, kaj donaci bagatelan sumon estos malrespekto al premioto). La esenco de REU-premio estos alia. Ĉiuj ni jarfine havas certajn dezirojn, kaj en pleja profundo de la animo ni kredas, ke Avo Frosto ja ekzistas kaj sekvajare li nepre plenumos niajn revojn. REU volas asisti Avon Froston. Tial laŭreato rajtos je plenumo de unu movada deziro (ĉu helpo pri aliĝo al kongreso, ĉu abono de periodaĵo, ĉu io alia). Konkretaj deziroj estos traktitaj private inter la Estraro kaj laŭreatoj.

Krome la Estraro decidis, ke ĉiujare estos ne pli ol du premiitoj (eble nur unu). Sendube ni havas multajn aktivajn esperantistojn, kiuj meritas esti menciitaj. Do iom-post-iom ni provos menciĝi ĉiujn. Ni esperas, ke nia iniciato estos subtenata ankaŭ en la postaj jaroj.»

(Arosev G. *REU-premio en 2010*. // «Bulteno de REU». — 2011. — №62 februaro. — p. 6. // «Rusia Esperanto-gazeto». — 2011. — №1 (62) februaro. — p. 30.)

La koncerna novaĵo en la paĝaro: <http://reu.ru/informoj/eo/107>

La teksto aperis kiel «novaĵo» en la paĝaro <http://reu.ru> kaj poste kun minimumaj gramatik-speciaj korektoj estis publikigita ankaŭ en «REGo». Atentindas, ke en «REGo» tiu ĉi teksto kune kun la nomoj de la unuaj premiitoj apartenas jam al la parto «Bulteno de REU», diference de la antaŭkelkjaraj «Atingoj de la jaro», laŭreatojn de kiuj oni anoncadis sur kovrilfolioj.

En la antaŭa kajero de «Ponto» vi povis legi la freŝakceptitan de la Estraro «Regularon pri Esperantisto de la jaro laŭ la versio de REU» (*protokolo №7 de 08.12.2019*, «Ponto». — 2019. — №109 decembro. — p. 2.). Se ĉe vi aperos demando, ĉu ĝi estis inspirita de tiu teksto de G. Arosev de la 2010-a jaro — la respondo estas: ne. Ĉar la tekston ni retrovis jam post kiam verkis kaj akceptis la regularon. Do, rigardu la tekston de G. Arosev nur kiel historian dokumenton.

La unuaj premiitoj de tiu establita en la jaro 2010 premio estis Anatolij Ivassenko kaj Georgij (Garik) Kokolija.

En 2011 la premion ricevis Andrej Grigorjevskij. En 2012 laŭreatiĝis Viktoro Aroloviĉ.

Por la jaroj 2013 kaj 2014 nek Viktoro en arĥivo de «REGo» nek Aleksandr en retroŝta arĥivo kaj interreto trovis iun ajn informon pri premioj. Oni povas konkludi, ke en tiuj du jaroj la REU-premio ne estis aljuĝita.

En la sekvaj jaroj laŭreatoj estis. Oni jam uzas por ili la titolon «Rusia Esperantisto de la jaro» aŭ similaĵojn. La vortumo iom diferencas de jaro al jaro. Laŭreatiĝas Aleksandr Blinov (por 2015), Jefim Zajdman (2016), Raja Kudrjavceva (2017), Vladimir Sapojnikov (2018), Mikaelo Bronŝtejn (2019).

Sube ni donas la plenan liston de la laŭreatoj de REU-premio (rusiaj esperantistoj / esperantistoj de la jaro laŭ versio de REU) kun la koncernaj vortumoj. La listo enhavas nur REU-premiitojn, ekde la establo de la REU-premio en la jaro 2010. Ĝi ne tuŝas la honorigojn enkadre de la malnovaj «Atingoj de la jaro».

La listo

2010 — REU-premio — Anatolij Ivassenko kaj Georgij Kokolija

«1. Anatolij Ivassenko — pro vigligo de E-movado en Krasnodara regiono (aktivado en ruslingva gazetaro, okazigo de E-kursoj, fondo de E-klubo kaj organizado de E-renkontiĝo). REU anticipe gratulas Anatolij Ivassenko pro la 45-jariĝo de lia E-vivo!»

«2. Georgij Kokolija — pro redakta kaj eldona aktivado. Li komencis tiaspecan agadon en 1993 per eldonado de *SEJM-info* — en la dua duono de la 90-aj sola regule aperanta informfonto pri junulara agado en Rusio. Sed la ĉefa laboraĵo de Garik iĝis *Rusia E-gazeto* (REGo), kies 10-jariĝo estis celebrata en 2010 (same kiel la 30-jariĝo de E-vivo de Georgij). REGo estas altkvalita eldonaĵo, kiu bone respiegulas staton de E-movado en nia lando.»

«*Bulteno de REU*». — 2011. — №62 februaro. — p. 6. // «*Rusia Esperanto-gazeto*». — 2011. — №1 (62) februaro. — p. 30.

Novaĵo en la paĝaro: <http://reu.ru/informoj/eo/107>.

2011 — REU-premio — Andrej Grigorjevskij

«La laŭreato en 2011 fariĝis Andrej Grigorjevskij, kiu estas premiita pro sia multjardeka aktivado, kadre de kiu li gvidis multegajn E-kursojn kaj organizis kelkajn klubojn en diversaj urboj, ĉeforganizis la unuan internacian E-aranĝon en nia lando — IJK en 1995, dum kelkaj mandatperiodoj prezidis REU, estis redaktoro de periodaĵoj, kaj lastatempe faras grandegan ne-tuj-videblan laboron — prizorgas la retejon <reu.ru>, kiu en la nuna tempo estas gravega instrumento de la agado.»

«*Bulteno de REU*». — 2012. — №68 februaro. — p. 1–2. // «*Rusia Esperanto-gazeto*». — 2012. — №1 (68) februaro. — p. 20–21.

2012 — REU-premio — Viktoro Aroloviĉ

«Viktor Semjonoviĉ laŭreatiĝas pro daŭra diverspostena agado en REU (kaj pli frue en SEU, ASE kaj SEJM), pro (kun)redaktado de diversaj esperantlingvaj libroj kaj periodaĵoj, pro siatempa kungvidado de la moskva E-klubo „Lev Tolstoj—kaj ankaŭ pro kontribuo en la E-literaturon pere de tradukado kaj originalaj verkoj.»

«*Bulteno de REU*». — 2013. — №74 februaro. — p. 2. // «*Rusia Esperanto-gazeto*». — 2013. — №1 (74) februaro. — p. 20.

2013 — ne estis aljuĝita.

2014 — ne estis aljuĝita.

2015 — Esperantisto de la Jaro 2015 en Rusio — Aleksandr Blinov

«Laŭ la decido de REU-Estraro (28.12.2015 pro multjara senlaca brila laboro rilate organizadon kaj efektivigon de la Lingvaj festivaloj en Ĉuvaŝio Aleksandr BLINOV estas elektita kiel esperantisto de la Jaro 2015 en Rusio kaj estas premiata per la jarabono de la „Beletra Almanako—Gratulojn kaj plurajn sukcesojn!»

«*Bulteno de REU*». — 2016. — №83 januaro. — p. 1.

Novaĵo en la paĝaro: <http://reu.ru/informoj/eo/189>.

2016 — Rusia esperantisto de la jaro 2016 — Jefim Zajdman

«Laŭ decido de la Estraro de REU de la 6-a de decembro 2016 rusia esperantisto de la jaro 2016 estis nomumita Jefim Zajdman el la urbo Jalto — pro senlaca laboro pri organizado de renkontiĝoj, preparado de novaj esperantistoj, modela gvidado de la loka klubo kaj pluraj aliaj meritoj.»

«*Bulteno de REU*». — 2016. — №87 decembro. — p. 2.

Novaĵo en la paĝaro: <http://reu.ru/informoj/eo/218>.

2017 — Esperantisto de la jaro 2017 — Raja Kudrjavceva

«Proklami membron de REU samideaninon Raja Kudrjavceva (Jekaterinburgo) Esperantisto de la jaro 2017 pro elstaraj meritoj en la multjara kaj sukcesa agado en la Urala regiona kaj tutrusia esperantistaj movadoj.» (protokolo №7 de la Estrara decido de 29.11.2017).

«*Bulteno de REU*». — 2017. — №93 decembro. — p. 2–3 (la protokolo), 5–6 (la artikolo de V. Opletajev).

2018 — Esperantisto de la jaro 2018 — Vladimir Sapoĵnikov

«Proklami membron de REU s-on Vladimir Sapoĵnikov (Krasnojarsko) Esperantisto de la jaro 2018 pro la grava kaj sukcesa agado sur la posteno de regiona kunordiganto de REU en Siberia regiono kaj pro la aktiva partopreno en la tutrusia esperantista movado.» (protokolo №16 de la Estrara decido de 01.12.2018).

«*Bulteno de REU*». — 2018. — №100 decembro. — p. 2 (la protokolo), 3–4 (la biografio).

2019 — Esperantisto de la jaro 2019 laŭ la versio de REU — Mikaelo Bronŝtejn

«Proklami sinjoron Mikaelo Bronŝtejn (Tihvin) Esperantisto de la jaro 2019 laŭ la versio de REU pro la sukcesa organizo de Tihvinaj Esperanto-Metiejoj apud Tihvin la 15-an – 21-an de julio 2019 kaj pro la elstara multjara verkista, tradukista kaj muzika agado.» (protokolo №8 de la Estrara decido de 15.12.2019).

«*Ponto*». — 2019. — №109 decembro. — p. 2.

Novaĵo en la paĝaro: <http://reu.ru/informoj/eo/301>.

Viktoro Aroloviĉ, Aleksandro Lebedev

100% de aktiveco!

Ideo organizi klubkunvenon kun la temo "Ni paŝas tra la landoj kaj kontinentoj" aperis en mia kapo frue matene. Vespere mi komencis telefoni al aktivuloj. Temo al ili ekplaĉis kaj ĉiuj volonte komencis elekti landon, pri kiu rakontos. Mi estis tre kontenta kaj telefonis al aliaj!

Nia kunveno (en mia loĝejo) komenciĝis je la 12-a horo per rigardado de kolektoj de fotoj pri funkciado de klubo: nuntempa kaj de 80-90-aj jaroj. Ni rememoris, demandis, rakontis. Kiam ĉiuj 10 homoj alvenis, ni eksidis ĉirkaŭ tablo. Formon de prelegoj mi proponis liberan: kiu kian materialon trovas kaj elektos, tiel prezentos.

Plej longa kaj interesa estis rakonto de Svetlana Arhipova pri Nepalo. Ŝi havas tie korespondamikon, multe de li eksciis kaj emocie al ni rakontis. Montris ŝi ŝtatan flagon kaj blazonon. Kun intereso ni aŭskultis la rakonton de Ludmila Bykova pri Finnlando. Ŝi havis grandan bele faritan libron pri la lando kaj ni poste trarigardis ĝin. Verŝajne, multaj kluboj havas "eternajn komencantojn". Unu el ili estas Galina Gackan. Ĉi foje ŝi sukcese tralegis propran rakonton pri Prago.



Ŝi maltrankvilis kaj ni subtenis ŝin per aplaŭdo. Dmitrij Ĵuravljov, kiu alveturis kun du siaj kursaninoj, rakontis al ni pri Ĉinio. Nuntempe li memstare studas ĉinan lingvon kaj prezentis la faktojn pri ĝi. Li sur speciala tabuleto skribis ideogramojn kaj klarigis iliajn signifojn. Junulinoj ankaŭ prezentis al ni mallongajn prelegojn: Anjo prelegis pri Turkio kaj Luda – pri Moldavio. Ni gratulis ilin, aplaŭdis.

Irina Mironova dum ia tempo loĝis en Svedio kaj rakontis al ni pri ĝi. Jurij Zagidulin tre volas viziti Hispanion kaj parolis pri ĝi. Finfaris nian teman konversacion mi per rakonto pri Francio. En Francio mi loĝis dum kvin plenaj vintraj sezonoj kaj ne nur. Mi vizitis multajn urbojn, katedralojn, palacojn k.t.p. Vidis ĉiutagan vivon de familioj.

Pri kelkaj interesaj faktoj mi rakontis. Ekzemple, ke mi kun tri francaj geamikoj vizitis lokon, kie super rivero, perpendikle al ĝi, estas kanalo! En ambaŭ estis akvo kaj ŝipoj. Ĉefa konstruisto de objekto estas fama Eiffel.

Dum tuta nia "marŝo tra la landoj" etoso estis bona kaj varma. Estis multaj demandoj, aldonoj, ĝustigoj. Al ĉiuj estis interese. Inter ni estis Svetlana Pavlova – poetino. Post multjara paŭzo ŝi revenis en Esperanto-movadon, sed vizitas niajn aranĝojn malofte. Ni permesis al ŝi paroli ruse kaj petis deklami. Ŝi bone tralegis poemon "Rusa balo".

Sur horloĝo jam estas preskaŭ la tria horo. Ĉiuj estas malsataj. Mi supozis, ke ĉi-foje povos okazi ne sufiĉe da kutimaj produktoj por teumado, kiujn ĉiujn alportis: dolĝĉaĵoj, buterpanoj, fruktoj. Kaj mi kuiris plenan kaserolon da terpomo kun viando. Ne forgesis pri acida brasiko. Oni formanĝis ĉion ĝis la fino kun apetito. Post la teumado forveturis kvar homoj, aliaj daŭre kunestis.

Valentina Spicina, Volgogrado.

Tradicia kunveno de la tagilaj esperantistoj

La 18-an de januaro, sabate, okazis tradicia kunveno de la tagilaj esperantistoj. Ni estis triope, tamen ni konas unu la alian pli ol tridek jaroj, do, ni ĉiam havas komunajn temojn por diskutado kaj babilado. Ĉi-foje, Valerij Borodin elpaŝis kun la iniciato, ke en Niĵnij Tagil oni devas nomi unu el la novaperontoj stratoj la strato de Esperanto. Ni ĝoje apogis bonan proponon. Valerij Borodin verkis leteron al la speciala fako de la urba administrado. Li jam ricevis la respondon la 24-an de januaro, ke laŭ la enketo de publika opinio, tiu ĉi propono povos realiĝi estonte. Ni havas kelkajn ideojn, kion fari, ke tiu iniciato povu plenumiĝi. Due, Lidija Erofejeva enmanigis diplomojn kaj donacojn de Raja Kudrjavceva al du Valerij por ilia kontribuo al la projekto "Ĵibroj, kiujn ni legas" dediĉita al la 160-a jubilea dato de nia Majstro.

Lidija Jerofejeva, Niĵnij Tagil.



Kluba vivo – Ekstera informado

Flugo de Esperanta Strigido tra la lando, dediĉita al 25-a datreveno de MEA MASI

La 24an de februaro 2020 Moskva Esperanto-Asocio MASI festos sian 25-an datrevenon. Ĉe la sojlo de la sekva centjarkvarono ĉarma lanuga strigido Masja – reprezentanto de MEA MASI – ekis sian tutjaran flugon tra la vasta Rusio.

Komence ĝi venis al Barnaulo, kie scivoleme ĉeestis la tutan programon de Novojarsko-5. Poste en varma kompanio ŝi trajnis al Krasnojarsko, kie vizitis ĉefajn urbajn vidindaĵojn, fotiĝis kun lokaj esperantistoj kaj kun homoj, kiuj la unuan fojon ekaŭdis pri Esperanto dank'al renkontiĝo kun ŝi. De Krasnojarsko nia vojaĝemulino trafis al la urbo Ŝaripov – dank'al kio ni eksciis multon novan pri la urba historio kaj ties Esperanta Movado. Legu la rakonton de Sergeo Ĵilejkin kaj sekvu la strigidan flugon tra la lando en ŝia gripo VKontakte – Esperanto-strigo por gastigo. Tutjara flugo de MASI-Strigido tra Rusia Esperantujo”. Masja atendas vian inviton!

Irina Gončarova, kunordiganto de MEA MASI

"Strigido" en urbo Ŝaripovo



Dum Novojarsko-2020 en Barnaulo Irina Gončarova lanĉis projekton "Strigido", kies celo estas konigi Esperanton al tiuj, kiuj neniam aŭdis pri la lingvo. La ideo estas jena: strigido-ludilo devas esti transdonata de esperantistoj el unu urbo al esperantistoj de iu alia urbo en Rusio dum jaro, kaj reveni al Irina februare de la 2021. En ĉiu urbo la strigido devas esti fotita: 1) kun lokaj esperantistoj, 2) surfone de iu(j) loka(j) vidindaĵo(j), simbolo(j), 3) kun homoj kiuj unuan fojon eksciis pri Esperanto. La ludilo, kiu surhavas insignon kun surskribo "Mi parolas esperante", mem povas esti preteksto por ekparoli pri la temo.

El Barnaulo la strigido "flugis" al Krasnojarsko, kie okazis parto de la projekto. Laŭ la komenca plano la ludilo devis vojaĝi plu al Tomsko. Sed geamikoj memorigis al mi, ke mi originas el Ŝaripovo, ankaŭ kiel esperantisto. Do, la sekva urbo de la projekto iĝis Ŝaripovo.

Fine de la 70-aj - komence de la 90-aj

jaroj de la pasinta jarcento Ŝaripovo estis ĉefurbo de lasta Tutsovetia Sturma Komsomola Konstruado, KATEK. Oni konstruis la urbon, infrastrukturajn kaj industriajn entreprenojn. Sed la ĉefa konstruaĵo, certe, estis unuenaskito de KATEK, la potencega elektrostacio (noto por redaktoro: diference de centralo – TEC) Berjozovskaja GRES (ne estis finkonstruita).

Homoj venadis konstrui KATEK-on el la tuta lando. Unuopuloj, familioj, brigadoj, eĉ iam - tutaj organizoj. Romantikuloj, ŝatantoj de "longa rublo", aventuristoj. Dufoje en ĉiu jaro al la konstruejo venadis komsomolaj taĉmentoj el ĉiuj regionoj de Sovetunio. Diference de anoj de studentaj konstrutaĉmentoj, kiuj ankaŭ abundis ĉiusomere, ili venadis por vivi en la urbo konstante, geedziĝis, naskis infanojn.

Vivo en Ŝaripovo, en kiu averaĝa aĝo de loĝantaro estis 28, bolis, svarmis, buntis. La urbon vizitas famegaj gastoj: kosmonaŭtoj, artistoj, sportistoj... Kiel fungoj kreskis diversaj kluboj, rondetoj, aperis la urba teatro. Festivaloj, renkontiĝoj, kunvenoj diversspecaj sekvis unu la alian...

La 4-an de februaro de 1982 jaro startis la unua kurso de Esperanto en la urbo. Ĝin gvidis Nina Izmajlova veninta al la urbo laŭ distribuo post fino de instituto en Novosibirsk. Dum la 80-aj jaroj ŝaripova geesperantistaro ofte renkontiĝis en la klubo, piedmarŝis al naturo, parolis kaj kantis Esperante, organizis kursojn, aktive partoprenis urbajn aranĝojn, regionajn kaj tutsovetiajn Esperanto-renkontiĝojn...

Nun en Ŝaripovo loĝas ĉ. 35 mil loĝantoj, inter kiuj troviĝas ses esperantistinoj. Renkontiĝon enkadre de la projekto "Strigido" partoprenis tri el ili. Mi rakontis al ili pri la pasinta Novojarsk, pri planataj ĉi jare E-aranĝoj, invitis aliĝi al RET. Ni teumis, rememoris malnovajn amikojn el diversaj urboj, kantis, parolis pri nia libervola tasko kaj morala devo propagandi kaj evoluigi nian amatan lingvon. Fine ni kun speciala atento legis verson de Zamenhof "La vojo". La vespero estis tre inspira. Espereble, la samideaninoj aktiviĝos.

Sekvatage ni kun unu el la lokanoj, Ljudmila, iris urben kun la strigido por rakonti pri Esperanto kaj fari fotojn ĉe la konsento de la homoj. Ni rakontis strate, en librovendejo, en kafejo, en telefonbutiko, ĉie, kie estis pli-malpli konvena situacio. Rezulte pli ol dek homoj unuafoje en sia vivo eksciis pri la lingvo. La strigido helpis al ni lanĉi aŭ daŭrigi la parolon.

La strigido komencas sian krozadon laŭ la lando. El Ŝaripovo ĝi forvojaĝis al Tomsko.

Sergej Ĵilejkin, u. Krasnojarsko



MEA MASI festas 25-jariĝon dum APERo-14

Via partopreno estas kore bonvena!

La 24an de januaro Moskva Esperanto-Asocio MASI iĝos 25-jara. Kvaronon da jarcento antaŭe ambasadoro de Hungario Gyorgy Nanofsky, en ĉeesto de la rektoro, instituta administraro kaj dekoj da studentoj-esperantistoj, distondis ruĝan rubandon en la biblioteka salono de Moskva aŭtomobilkonstrua instituto (MASI), simbolante aperon de nova esperantista kolektivo — Moskva Amikaro de Studentoj kaj Instruantoj (MASI). Ekde tiam senlace, seninterrompe kaj sukcese MASI laboras por Moskva kaj Rusia Esperanta Movado: popularigas Esperanton, instruas ĝin, organizas Esperantajn eventojn, vojaĝas per kaj por Esperanto. Niaj agadoj, kiel teatraĵoj, lingvaj festivaloj, Esperanto-Poŝtkruciĝo, gazetaj artikoloj ktp estas vaste konataj tra Rusio kaj eksterlande.

Okaze de MASI-naskiĝdato la kolektivo ĉiujare organizas eventon kun la nomo APERo (Antaŭprintempa Esperanto-Renkontiĝo). Ĝia komenca ideo estis lingva mergiĝo por finintoj de parola Esperanto-Kurso FaRo (—Faru la Rondon!), pasanta kun partopreno de ne nur komencantoj, sed ankaŭ spertaj esperantistoj — por kreo de natura Esperante parolanta medio. Nun la evento akceptas ĉiujn homojn, kiuj pretas gardi la lingvan disciplinojn, ne krokodilante.

La programo de APERo neniam estas lingvoinstrua, sed nur tempopasiga, kun kleriga kaj distra lingvopraktika enhavo.

La temo de ĉi-jara APERo estas —Jubileoj—. Jes, ajnaj jubileoj — Esperantaj, historiaj, sciencaj, kulturaj, privataj ktp — okazintaj kaj okazontaj iam ajn. Tamen kun dezirinda akcento ĉe la jaro 2020.

Se vi partoprenus nian APERon, kiun jubileon vi prezentus? Eble, vi eĉ povus aperi ĉe APERo kun viaj programkontribuoj?

Kun danko ni akceptus viajn salutojn kaj gratulojn okaze de MASI-jubileo!

Viaj kontribuoj en ajna formo multe variigus nian programon kaj aldonus al ni senton de kunapogo kaj esperantista amikeco.

Ni atendas vin la 21-24an de februaro 2020, Apudmoskve (ripozejo —Jerŝovo— de Odincova distrikto). Detalojn vidu en la Aliĝilo:

https://docs.google.com/forms/d/e/1FAIpQLSdtpPhvHimofzaMscitXapFAk1WMFty_7Y19ORnTACyt8Sjg/viewform

Konkurso! KVIZO PRI JUBILEO-2020

Bonvolu sendi 10 demandojn pri iu evento aŭ persono, ligita kun la jaro 2020!

Plej interesajn kvizojn ni uzos en programo de APERo. Tri el ili estos premiitaj per speciale eldonita bildkarto, 10 ekzemplerojn de kiu ricevos la gajnintoj.

Aliaj konkurskontribuantoj ricevos po unu sama karto perpoŝte.

Inspiran kreadon kaj gajnon!

Se vin interesas ĉeesta aŭ virtuala partopreno en APERo kaj en la jubilea konkurso, bonvolu turni vin al mirinda.strigo@gmail.com BONVENON!

La 12an de januaro 2020 estis la 130-jara jubileo de la fama blinda esperantisto Vasilij Eroŝenko — poligloto, mondvojaĝanto, poeto, verkisto en diversaj lingvoj

VASILIJ EROŜENKO KAJ ESPERANTO

(referaĵo de A. Masenko (Kislovodsk), prezentita dum la internacia konferenco okaze de la centjara datreveno de V. Eroŝenko, Belgorod, julio 1990)



Kiam nia karmemora majstro d-ro L.L.Zamenhof estis kreanta sian projekton de la internacia lingvo, apenaŭ li pensis pri tio, ke ĝin uzos blinduloj. Sed ĝuste blinduloj tiutempe, eĉ pli ol vidantoj, bezonis tian interkomprenilon, kiu helpus solvi iliajn multnombrajn vivproblemojn (eblecoj por studi kaj labori, libroeldonado en brajlo kaj aliaj). Do, jam dum la tria UK en Cambrigge (1907) kolektiĝis pli ol dudek blinduloj el sep landoj. Ĝuste tiam okazis la historia renkontiĝo de la blinduloj kun Zamenhof mem, kiu varmkore salutis ilin. Respondparolante, la eminenta pioniro de blindul-esperantista movado Harald Thilander (Svedio) i.a. diris: "nevidantoj uzadas Esperanton ĉefe kiel gravan, ege taŭgan laborilon, tre utilan en la internacia kunlaborado".

Ankaŭ por nia fama samlandano Vasilij Jakovleviĉ Eroŝenko (1890-1952) Esperanto iĝis tiu fabela ora ŝlosileto, kiu malfermis antaŭ li pordon en la vastan mondon, dank' al Esperanto li akiris diversnaciajn fidelajn amikojn. Jes, li estis blinda, sed li ne deziris esti ankaŭ muta. Vizitante tiun aŭ alian landon, li ĉiam zorgis ekposedi ties lingvon, fine do li fariĝis vera poligloto. Tamen al Esperanto estis ligita lia tuta vivo.

Fininte moskvan blindulleternejon en 1908, Eroŝenko komencis sian memstaran vivon kiel restoracia muzikisto-violonisto. Tio tamen ne povis lin kontentigi, ĉar li deziris plu lerni kaj tre suferis anime, ne havante tiun eblecon. En 1911 la feliĉa okazo konatigis lin kun A.N.Ŝarapova, la instruistino pri fremdaj lingvoj. Anna Nikolajevna Ŝarapova (1863-1923) estis bofratino de Pavel Birjukov, la disĉiplo kaj biografo de Lev Tolstoj. Ŝi estis aktiva esperantistino, kaj ŝi esperantigis kelkajn verkaĵetojn de Tolstoj. La sopiroj de la blinda junulo profunde kortuŝis la kleran kaj bonkoran virinon. Ŝi konsilis al li unue lerni la anglan kaj poste iri Londonon, ĉar tie plej elstara estis la eduko de blinduloj per novaj, modernaj metodoj. Sed en la tuta Rusio Eroŝenko ne sukcesis trovi brajlan lernolibron pri la angla, kaj malespere li lamentis tion al la instruistino en ĉeesto de ŝia 15-jara nevino, kiu jam estis esperantistino. La bonkora knabino tre kompatis la blindan junulon kaj proponis, ke ŝi instruu al li Esperanton. La lecionoj do komenciĝis. La surprizita knabino pli kaj pli admiris, ĉar ŝia lernanto havis neimageblan memorkapablon. Kiel seka spongo la akvon, li suĉis en sin la lingvon: sufiĉis al li nur unufoje ekaŭdi regulon, vorton, esprimon, por ke li neniam plu tiujn forgesu. Post dumonata perfekta lernado Eroŝenko parolis Esperanton eĉ pli flue ol lia instruistino. De nun li regule vizitadas moskvan Esperanto-klubon sur Lubjanskaja-strateto, konatiĝas kaj konversacias tie kun interesaj homoj, kaj plifirmiĝas lia arda deziro ekkoni la mondon, kiu lin ĉirkaŭas. Laŭ lia propra konfeso, lia unua eksterlanda vojaĝo estis instigita ankaŭ de prof. E. Privat, kiu venis Ruslandon kun speciala misio – alvoki slavajn esperantistojn partopreni la novefonditan regnon Esperantujo. Sekvis vigla interkorespondado kun anglaj esperantistoj. Kaj jen dum la malvarma februara tago 1912 Eroŝenko per trajno ekvojaĝis al malproksima Anglio. Estas menciinde, ke tiutempe la simila vojaĝo de sola blindulo estis vera sensacio.

La komenco okazis iom konfuza, ĉar neniu renkontis Eroŝenkon en Varsovio, sed ĉe aliaj trajnoŝanĝoj en Berlin, Koeln, Brüelles, Cale, Duvr li estis feliĉe renkontata de UEA-delegitoj kaj aliaj gesamideanoj, kiuj estis anticipe avertitaj de Ŝarapova, kaj volonte ili helpis lin, eĉ konatigis kun rimarkindaĵoj de la koncernaj urboj.

En Londono Eroŝenko, ĉiam helpata de gesamideanoj, perfektigas sian anglan lingvon kun la sama mirakla rapideco kiel Esperanton; dum du monatoj studas en Normal Royal College, ofte vizitadas bibliotekojn, akiras abundajn konojn diversflankajn kaj poluras sian intelekton.

En septembro 1912 li perŝipe revenas Peterburgon. Ni ne scias kial, sed Japanio iĝis sekva vojaĝcelo de Eroŝenko, kaj reveninte Moskvon, li fervore lernas japanan lingvon. Fine de aprilo 1914, komisiita de Rusa Esperanta Federacio, tra Siberio li alvenis Tokion, kie lin varme akceptis tieaj samideanoj Nakamura Kiyoo, Osaka Kenzi kaj aliaj. Japana Esperantista Asocio fondiĝis en 1906. Sed kiam alvenis Eroŝenko, en la lando regis "vintro" de la socia vivo, stagnis ankaŭ Esperanto-movado. Fidelaj esperantistoj tamen klopodis reaktivigi la movadon, kaj Eroŝenko multe kontribuis ĉi-rilate, pruvante ĝian vivantecon.

Baldaŭ li fariĝis studento de la Blindula Kolegio en Tokio, kie krom la masaĝarto li perfektigi en la japana lingvo kaj studis literaturon. Ankaŭ li instruis Esperanton al la blindaj studentoj. Ĉar forestis la lernolibroj brajlaj, la instruado okazis perbuŝa, akompanata per ludoj kaj kantoj. Post nelonge li okazigis Esperanto-kurson en la blindulleternejo de Osaka. El inter liaj kursanoj poste elkreskis tiaj elstaraj pioniroj de la blindula movado, kiel Torii Tokujiro, Takeo Ivahaŝi, Tecutaro Kumagai kaj aliaj.

En 1916, post la naŭjara interrompo, en Japanio okazis la tria Esperanto-kongreso, dum kiu Eroŝenko parolis pri mondopaco, bahaismo, esperantismo, kaj, ludante balalajkon, li plenumis rusajn popolajn kantojn. Ne, li mem ne iĝis bahaisto, sed el la angla li esperantigis kaj publikigis ankoraŭ en 1915 la "Kaŝitajn vortojn" de Baha'u'llah, la fondinto de tiu ĉi religio. Eroŝenko estis adepto de la alia nobla ideo: "Esperantismo estas spirito, sen kiu unuigo de l' popoloj en unu familio estos ne ebla, sen kiu la universala amo, frateco de l' homaro, internacia paco kaj multaj aliaj ideoj restos nur tedaj vortoj".

Por aranĝi la propagandajn Esperanto-kunvenojn kaj koncertojn Eroŝenko vojaĝis al Okcidenta landparto, kaj neniam li zorgis pri sia poŝo. Jen, ekzemple, kion li skribis en 1916 al sia intima amiko Torii Tokujiro antaŭ E-aranĝo en Kioto: "Oni devas aranĝi ĉion tiel, ke ni povu gajni iom da mono. Tiun ĉi monon mi donacos al la blindaj esperantistoj de Japanujo, mi nenion prenos por mi mem".

Post dujara vojaĝo tra Siamo, Birmao kaj Hindio Eroŝenko en 1919 denove trafis Japanion. Intertempe gravaj ŝanĝoj okazis en la mondo: finiĝis la dua mondmilito, en Rusio venkis bolŝevikoj, kaj en Japanio plivigliĝis socialistoj, inter kiuj Eroŝenko havis multajn amikojn. Nun li estas konata al la publiko ne nur kiel talenta japanlingva verkisto, sed ankaŭ kiel arda liberama oratoro dum la mitingoj de socialistoj. Rezulte kiel homo kun danĝeraj ideoj li estis ekzilita el Japanio Vladivostokon, en kiu regis tiam blankuloj. Estis junio 1921.

En la skizo "Adiaŭ Japanio" Eroŝenko rememoris: "Vladivostokaj esperantistoj bone konis min kaj renkontis tre gastame. Ili estis ege indignitaj per tio, ke oni forpelis min el Japanio, kaj ili deklaris, ke ili rakontos al la tuta mondo pri la kontraŭleĝa ago de la japana registaro. Prezidanto de Esperanto-societo proponis al mi loĝi ĉe li ĝis kiam en Rusio ĉio trankviliĝos".

Kaj eĉ tie ĉi Eroŝenko ne forgesas siajn Esperanto-amikojn en Japanio. Mi citas lian leteron, senditan el Vladivostoko la 12.07.1921 al fama dramverkisto Akita Uzyaku: "Tie ĉi mi eksciis, ke nun en lernejoj de la laborista-kampana Rusio estas bone organizita Esperanto-instruado. Ĉu eble ankaŭ vi okupiĝos pri Esperanto-instruado al miaj karaj japanaj studentoj? Interalie, pli ofte rakontu pri esperantismo. Se feliĉo ridetos al mi, kaj bonorde mi atingos Ĉita-n, eble oni direktos min kiel delegito de la loka Esperanto-societo al la 13-a UK en Praha".



Лу Синь и В. Ерошенко.
Пекин, 1922 г.

Ne, ankaŭ ĉi-foje la sorto al li ne favoris. Ial oni malpermesis al li eniri Sovetlandon, kaj en oktobro 1921 Eroŝenko jam paŝadis tra la stratoj de orienta urbo-giganto Ŝanhajo. Ne estis longa lia restado en Ĉinio, ne pli ol unu jaro kaj duono, sed tre fruktodona kaj memorinda. Ankaŭ tie ĉi li trovis sincerajn kaj helpemajn amikojn. En Ŝanhajo Eroŝenko malkomforte loĝis en iu masaĝejo, sed varmkore lin zorgis Hujucz, juna literaturisto kaj tiea UEA-delegito. Tuj Eroŝenko estis akceptita kiel instruisto de la Esperanta Lernejo, fondita en 1920. Hujucz aperigis sian ĵurnalan artikolon "Pri blinda poeto Eroŝenko". Ankaŭ Lu Sin, la granda ĉina verkisto kaj fervora subtenanto de la lingvo internacia, esprimis sian simpatian al Eroŝenko. Ankoraŭ antaŭ ilia persona renkonto Lu Sin tradukis kelkajn liajn japanlingvajn verkojn kaj kune kun Hujucz en januaro 1922 eldonis en Ŝanhajo ĉinlingve "Fabelaron de Eroŝenko". Komence de la jaro 1922 en Pekino Lu Sin kaj Eroŝenko persone renkontiĝis kaj interamikiĝis. Eroŝenko ekloĝis ĉe Lu Sin, kaj laŭ lia rekomendo ekde marto 1922 Eroŝenko fariĝis docento de la ĵus fondita universitata kurso pri Esperanto. Pri la rusa literaturo li prelegis ne nur en la universitato, ankaŭ en la superaj lernejoj, kaj liajn paroladojn oni ĉinlingve eldonis en 1924. Por ni gravas, ke ĝuste en Ĉinio Eroŝenko debutis kiel originala Esperanto-verkisto. Ankoraŭ en Ŝanhajo li verkis "Turo por fali" kaj "Unu paĝeto en mia lerneja vivo". En Pekino li daŭrigis la verkadon en Esperanto, kaj tiuj verkoj estis kolektitaj en la libron "Ĝemo de unu soleca animo" (Ŝanhajo 1923). Kelkaj liaj propagandaj artikoloj aperis en ĉinaj Esperanto-revuoj "Verda ombro" kaj "Verda lumo", ekzemple, la detale argumentita artikolaro "La neceseco de komuna lingvo".

En hejma arkivo de Nianila Jakovlevna, la fratino de Vasilij, estis la fotoĵo, sur kiu la patro surskribis jenan adreson: Китай. Правительственный национальный университет. Проф. эсперанто В. Ерошенко.

Kiel oficiala reprezentanto de la universitato Eroŝenko partoprenis tri sinsekvajn Universalajn Kongresojn (Helsinki 1922, Nurenbergo 1923 kaj Vieno 1924).

Samideano I. Bril (jam mortinta) el Ĥarkovo siatempe rakontis, ke el eksterlando li ricevis tipografie eldonitan bildkarton pri la UK15 en Nurenbergo. Apud la kongresejo staras grupo da esperantistoj kaj al ili proksimiĝas blindulo kun bastono kaj dorsosaketo. Tiu estis V. Eroŝenko. La bildkarton Bril pruntedonis al la verkisto samideano I.V. Sergejev, kiu, bedaŭrinde, mortis ne resendinte ĝin.

Interesa estas la rememoro de fama hungara esperantisto Kolomano Kalocsay: "En mia memoro aperas la figuro de tiu blindulo-poeto. En 1923, en la Nuernberg-a kongreso, per decidaj paŝoj suriris la podion tiu alta rekta viro kun abundaj, helblondaj haroj, fermitaj palpebroj, melankolia rideto sur la iom pala vizaĝo. Li deklamis per tre sugestia voĉo sian poemon "Antaŭdiro de la ciganino". La aŭdantaro estis surprizita kaj tute konkerita, tiel ke la juĝantaro, gvidata de Edmond Privat, donis al li la unuan premion por la plej bona esperanta prononco. Verdire, tiu prononco ne estis tute modela: la konsonantoj estis ofte tro molaj, la akcentaj vokaloj ofte sonis tro mallonge kaj akrafrape, sed la artismo de la prezento kaj la emocikirla enhavo de la poemo estis nerezisteblaj."

Post la 15-a UK Eroŝenko ne plu reiris al Pekino. Li restis en Eŭropo, vivis inter esperantistoj en Germanio kaj Francio. Tiun ĉi periodon bonege priskribis samideano Otto Baesler en "Paco", n-ro 7-8/1970.

Laŭ la protokolo, Eroŝenko vigle partoprenis kelkajn diskutojn dum la 16-a UK en Vieno 1924. Liaj hungaraj blindaj amikoj S. Lantos kaj L. Ulmer, kiujn mi renkontis dum la 51-a UK en Budapeŝto 1966, rememoris jenan neordinaran okazintaĵon: "Dum la ferma kunsido de la UK iu fama rumana ĵurnalisto tre entuziasme rakontis pri tio, ke li instruas Esperanton al la policistoj. Dum li flamis pro la entuziasmo, laŭdante la afablecon de la policistoj, Eroŝenko eĉ dufoje interrompis lin, je la aŭdo de ĉiuj, dirante: "sinjoro, sufiĉas jam pri polico kaj policistoj!" Post la kongreso, eble fine de aŭgusto 1924 Eroŝenko por ĉiam revenis sian patrolandon. Li restas aktiva esperantisto ankaŭ en Moskvo. Li instruas la lingvon al siaj geamikoj, iĝis tradukisto de la japana sekcio en KYTB (Komunista Universitato por Laborantoj de Oriento). Li plenumis interpretadon ĉe samideanino Emilie Suĥardova, kiu en 1925 venis Moskvon el Ĉeĥoslovakio kiel reprezentantino de Komintern, kaj ŝi eĉ partoprenis la fandan kongreson de Tutrusia Blindul-Asocio. Li helpis pretigi Esperanto-programojn de Moskva radio Komintern por eksterlando.

En oktobro 1927 kiel gasto ĉe la deka datreveno de la Oktobra revolucio vizitis Moskvon lia japana Esperanto-amiko Akita Uzyaku. Li restis en Moskvo ĝis la printempo 1928, kaj preskaŭ ĉiutage Eroŝenko vizitadis la malnovan amikon, helpante lian ekzercadon en la rusa lingvo. Eroŝenko helpis pretigi la manuskripton en Esperanto de la radioprelego pri japana proleta literaturo, kun kiu Akita elpaŝis en januaro 1928.



Blinda samideanino A.I. Iljina siatempe rakontis al mi, ke ŝi kune kun Eroŝenko partoprenis SAT-kongreson en Leningrad (aŭgusto 1926). Unue Eroŝenko mem elpaŝis, rakontante al eksterlandanoj pri vivo de blinduloj en Sovetunio. Kaj poste li instigis, ke ankaŭ samideanino Iljina parolu pri eblecoj de sovetaj blindaj virinoj.

Firmajn kontaktojn havis Eroŝenko kun Harald Thilander, la redaktoro de "Esperanta Ligilo". Ankoraŭ en 1924 aperis en EL lia novelo "Stranga kato". Dum la tridekaj jaroj li publikigis tie siajn skizojn pri vivo de blinduloj en Uzbekio, Armenio, pri blinda verkisto A.P. Belorukov, kaj en la "Stenografia angulo" aperis la novelo de Belorukov "Voĉoj de la strato", kiun el la rusa esperantigis Eroŝenko. Tuta serio de la skizoj sub titolo "El vivo de la ĉukĉoj" aperis en EL por 1933 post lia vojaĝo al la ekstrema Nordoriento de Siberio. La lasta skizo "La trimova ŝakproblemo" estis eldonita kiel suplemento al EL en 1947. I.a., la

aŭtoro tie skribis: "Ĉi tiun skizon mi verkis speciale por nia EL kaj dediĉas ĝin al miaj esperantistaj amikoj de la Malproksima Oriento..." Al ĉukĉa kulturbazo Eroŝenko venis fine de julio 1929, kaj jen kiel li tion priskribas: "Kiam mi ankoraŭ estis je distanco de multaj centmeiloj de la bazo, la bazanoj jam sciis pri mia alveno. La ĉukĉoj entuziasme rakontadis al ili, ke venas norden mirinda blindulo por viziti sian fraton, ke la blindulo vizitis multajn landojn, sed amas nur unu nekonatan al ili landon Esperantujon; ke li scias kelkajn lingvojn, eĉ la amerikan, sed preferas al ĉiuj la internacian lingvon Esperanto."

Ĝis 1932 ĉe la Centra Estraro de BOC (Tutrusia Blindulasocio) funkciis Esperanto-sekcio, kiu eldonis brajle kelkajn lernolibrojn de Esperanto kaj du numerojn de la socipolitika kaj literatura almanako, destinita por eksterlandaj esperantistoj. En la almanako mi trovis multajn tradukojn faritajn de Eroŝenko. En "Esperanta Ligilo" por aprilo 1933 Eroŝenko anoncis: "Karaj samideanoj! BOC komisiis al mi antaŭnelonge ordigi leterojn venintajn el alilando. La tre gravajn mi tradukis plene kaj transdonis al la Estraro de BOC, kaj nun pri respondo al ili mi tute ne estas respondeca. Al kelkaj leteroj mi respondis kun la konsento de la Estraro de BOC. Aliajn leterojn, en kiuj oni petis aŭ demandis pri la "Almanako", mi metis en ordon kaj notis adresojn por la BOC. En kelkaj leteroj konatoj kaj nekonatoj demandas BOC pri mia adreso. Jen ĝi estas: Arbat 7, Tipografia OGIZ n-ro 19, MOSKVA, USSR. Mi estas korektisto en la presejo (OGIZ estas "ŝtatpresejo") kaj laboras ankaŭ kiel neoficiala tradukisto ĉe BOC. Mi loĝas en Moskvo sed ĉiam serĉas pretekston por forgliti kamparen. Kiam mi estas en Moskvo, mi volonte korespondas kun alilandaj samideanoj, sed kiam mi loĝas kampare aŭ vagadas laŭlonge kaj laŭlarĝe de Sovetlando, korespondi kun alilando pro kelkaj kaŭzoj mi tute ne povas. Leterojn al mi bv. sendi rekomendite. Alie ili tre facile perdiĝas aŭ malfruiĝas. Se oni volas, ke letero nepre atingu min kaj ne tro malfru, oni devas sendi ĝin nigreskribe. Nia brajlopresejo dume nenion novan presas, kaj pro tio nia esperanta almanako kaj ankaŭ niaj brajlogazetoj "Ĵizn slepiĥ" kaj "Slepoj proletarij" (blinda proletaro) ne povas aperi. Ĉiutage ni esperas rekomenci laboron, kaj ni petas niajn abonantojn pri pacienco. Ĝis majo mi estos en Moskvo kaj volonte respondos ĉiujn demandojn laŭ mia kompetenteco. V. Eroŝenko".

Kaj nun ni transiru al vere unika vivperiodo de Vasilij Jakovleviĉ, kiam li pli ol dek jarojn pasigis en la plej suda ekstremo de Sovetio - en Turkmenio, do preskaŭ sur la sama loko, dediĉinte sin al pedagogia agado por blindaj infanoj. Intertempe ekstere furiozis la "granda purigo" de la stalina reĝimo kaj la dua mondmilito. La soveta esperantistoj estis persekutataj kaj pereigataj. Certe, la personeco de Eroŝenko estis ankaŭ suspektinda: oni kontrolis liajn privatajn leterojn; anstataŭ direktoro de la blindullemejo li nun iĝis simpla instruisto.

Jen estas fragmento el la letero de Eroŝenko al blinda esperantisto Ĉernecki el Minsk: "Кушка. 07.04.1940. ...Пишите мне по-русски. Эсперанто у нас не в моде; все центральные эсперантские учреждения закрыты, и многие работники арестованы как шпионы и предатели. Поэтому и у меня прекратилась всякая связь с моими зарубежными друзьями."

Se vi legis "La trimovan ŝakproblemon", vi certe rimarkis, ke la skizo estis reverkita ĝuste en tiu terura jaro 1937, do estis bezonata granda civitana kuraĝo por tiel akre kritiki la putriĝantan burokratismon en la lando.

En "Aŭroro" n-ro 2/1975 oni rakontis pri ĉeĥa blinda muzikisto František Brezina: "En la tridekaj jaroj la rusa verkisto Eroŝenko aperigis en "Esperanta Ligilo" anonceton, per kiu li serĉis blindan muzikinstruiston-esperantiston por de li estrata blindullemejo en Turkmena respubliko de SU. František, tiam muzikstudento en la blindullemejo de Brno, tuj eklernis la internacian lingvon kaj anoncis sin por tiu posteno. Tamen fine li ne ricevis ĝin, ĉar montriĝis, ke la sovetaj aŭtoritatoj ne pretis okupigi muzikinstruiston eksterlandan".

Interesan epizodon rememoris Durdy Petkulajev, unu el la lernantoj de Eroŝenko (poste li dum multaj jaroj prezidis Turkmenan blindulasocion: "Eroŝenko al multaj instruis Esperanton. Por ĉiam mi memoras la frazon: "Ĉu vi estas telegrafisto?" La frazo estis ligita kun jena okazintaĵo. Kiam ni laŭ bordo de la rivero provizis lignaĵojn por vintro, mi subite mispaŝis kaj falis la riveron. Naĝi mi ne scipovis, kaj malespere mi petegis la helpon. Vasilij Jakovleviĉ tuj reagis: –Durdy, ne timu, tamen kriegu, kriegu! Laŭ la krio mi alnaĝos". Kaj kiam li atingis min, li diris tute trankvile: –Sufiĉas kriegi, vi ja timigos la riveron". Poste, sur la bordo, ni ambaŭ sekiĝis, kaj mi neniel povis ĉesigi la nervan febron, la dentoj klakis kvazaŭ Morze-aparato. Vasilij Jakovleviĉ ekridis kaj diris: –Ĉu vi estas telegrafisto?"

Fine ni turnu nin al la rememoroj de Zinaida Ivanovna Ŝamina, malnova blinda esperantistino, proksima amikino de Eroŝenko: "Post la milito li skribis leteron al Stalin, la kuraĝan kaj saĝan. Kaj li ricevis respondon el la sekretario de Stalin, en kiu



oni klarigis, ke Stalin komprenas, kian signifon povus havi Esperanto, tamen nun ĝi ne taŭgas por interrilatoj kun aliaj landoj. Dum la antaŭlasta revido li diris al mi: "Zinjo, vi estas feliĉa! Vi ĝisvivos ĝis la tempo, kiam nia bona Esperanto venkos". Mi dubis. - KREDU kaj iom agu! - diris li". Liaj vortoj estu sankta testamento ankaŭ por ni, por tiuj, kiuj ne nur surbruste, ankaŭ en la koro ĉiam portas verdan lumon de l' espero.

En sia vivo Eroŝenko montris sin kiel verkisto, lingvisto, masaĝisto, pedagogo, muzikisto kaj bona ŝakisto, kaj ĉi ĉion li atingis dank' al sia persista laboro kaj Esperanto, dank' al la verda steleto, pri kies mirakla efiko Eroŝenko diris: "Jes, mi nun povas diri, ke la lampo de Aladeno ne povus helpi al mi pli, ol la verda esperantista steleto; mi estas certa, ke neniu geniulo de arabaj fabeloj povus fari por mi pli, ol la geniulo de reala vivo doktoro Zamenhof, kreinto de Esperanto".

Anatolo Masenko

DEKLARO DE UEA KAJ ILEI OKAZE DE LA INTERNACIA TAGO DE EDUKADO, 24 JANUARO 2020

Nelson Mandela: —La plej potenca armilo por plibonigi la mondon estas edukado.”

Universala Esperanto-Asocio (UEA), kune kun la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), gratulas Unuiĝintajn Naciojn kaj Unesko-n pri ties progreso, kunlabore kun ties Membro Ŝtatoj kaj kun neregistaraj organizoj kaj la civila socio, en plivastigo kaj en altigo de la kvalito de edukado tutmonde. La kvara Celo por Daŭripova Evoluigo alvokas al altkvalita edukado por ĉiuj personoj, surbaze de universala infana, elementa kaj meza edukado, kaj egaleca aliro al supera edukado. Ĝi alvokas al plibonigo de laborkapablo, seksa egaleco, universala leg- kaj skrib-kapablo (ankaŭ inter plenaĝuloj) kaj edukado por daŭripova evoluigo kaj tutmonda civitaneco.

Statistikaj donitaĵoj de Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko montras altiĝantajn nivelojn de leg- kaj skribkapablo tutmonde, pli multnombrajn frekventadon de lernejoj kaj progreson en virina edukado. Sed multaj infanoj kaj junaj plenaĝuloj tamen postrestas kaj sekve estas malhelpataj ricevi la kapablon vivteni sin kaj plene partopreni en demokratiaj procedoj. Kaj multe tro multaj infanoj malhavas la okazon evoluigi la valorojn de toleremo, komprenemo kaj malfermiteco – kio certigus pacon kaj kunlaboron en la estontaj jaroj.

Malgraŭ konsiderinda progreso, multaj milionoj da geknaboj (precipe knabinoj) ne frekventas lernejojn, al multaj mankas la scioj por perlabori decan vivon, analfabeteco vastas inter la plenaĝuloj, mankas instruistoj kaj oni malmulte atentis edukadon de gejunuloj pri ties respondecoj kiel mondaj civitanoj. Lingvoj ofte prezentas problemojn: eĉ tiuj infanoj, kiuj frekventas lernejojn estas ofte devigataj lerni en lingvo alia ol la propra, kio malhelpas ilian progreson; kaj malmultaj infanoj ricevas la kapablojn kaj okazajn por komunikiĝi kun homoj tra la mondo surbaze de egaleco, ĉu per lernado de iliaj lingvoj, ĉu per lernado de la Internacia Lingvo Esperanto.

La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ILEI, laborante per la internacia lingvo Esperanto kaj rilatante kun instruistoj en la tuta mondo, klopodas subteni la laboron de la instruistoj, lertigi ilin kaj doni al ili klaran kaj kompletan bildon de la celoj kaj laboro de UN kaj Unesko en la fako de edukado por ĉiuj.

La uzo fare de ILEI de la Internacia Lingvo Esperanto ebligas sperto-interŝanĝojn inter fakuloj pri edukado kaj pedagogoj el plej diversaj landoj. La laboro de geinstruistoj en la nuna mondo ne estas facila; pro tio, tiaj internaciaj kontaktoj, transdono de scioj kaj ekzemploj de efikaj strategioj estas ege valoraj kaj stimulaĵoj por la instruistoj.

ILEI kaj UEA daŭre informas siajn membrojn pri la Celoj por Daŭripova Evoluigo kaj ties celtabuloj, tiel kiel ili rilatas al edukado, kaj pri la graveco de konstruado de plene ekipitaj lernejoj en evolulandoj. Lernolibroj kaj instrumaterialo estas aĉetataj kaj cirkulas pere de la Esperanto-Movado; ankaŭ liverata estas financa helpo al konstruado de lernejoj, de akvoputoj kaj aliaj bezonataj iloj. Reciprokaj vizitoj oftas inter la kontinentoj. La esperantista NRO –Scio Sen Bariloj” proponas en Kotonuo, Benino, kursojn por junaj universitatnivelaĵoj kun tri aksoj: lertigado de virinoj en gvidaj roloj, skribado/legado de la fonua lingvo kaj Esperanto; tiuj kursoj forte kontentigas la partoprenantojn. Tiel, la Esperanto-Movado laboras paralele kun UN kaj Unesko.

UEA kaj ILEI instigas siajn membrojn utiligi sian scipovon de la Internacia Lingvo Esperanto por aserti la gravecon de internacia kompreniĝo kaj kunlaboro inter ĉiuj homoj kaj por helpi planti tiujn valorojn en la konsciojn de siaj kolegoj kaj de civitanoj ĉie.

Rotterdam 18.1.2020

Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 843, 2020-01-22

DEKLARO DE UEA OKAZE DE LA 75-A INTERNACIA DATREVENO POR LA HOLOKAŬSTO, 27 JANUARO 2020

Hodiaŭ, kiam 50 ŝtatgvidantoj kaj delegacioj de la tuta mondo kunvenas en Yad Vashem por mencii la 75-an datrevenon de la liberigo de Auschwitz kaj la viktimojn de la Holokaŭsto, UEA omaĝas al la memoro de la milionoj kiuj estis mortigitaj pro sia genta aparteno kaj religio, inter ili ankaŭ multaj esperantistoj inkluzive de familianoj Zamenhof. En tiu tago, kiun la internacia komunumo mencias en la dato kiam estis liberigita la ekstermejo Auschwitz, oni memoru la pasintecon kun instruo por la estonteco, ke neniam plu homoj estu persekutataj pro sia religia, genta aŭ kultura aparteno kaj la homaro atente respektu la homajn rajtojn je libereco, interalie de kredo kaj lingvo.

Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 844, 2020-01-23

Seminario: Kiel evoluigi kaj plibonigi la agadon de UEA

En la programo de "Novojarsko-2020" la 3-an de januaro 2020 je la 16:00-17:00 estis planita seminario "Kiel evoluigi kaj plibonigi la agadon de UEA". (V. Minin).

En la seminariejo ĉeestis ankaŭ la REU-prezidanto Aleksandr Lebedev. Antaŭe li diris al mi, ke REU ne planas iel evoluigi la kunlaboron kun UEA, sed daŭrigi nur tiun kunlaboron, kiu jam okazas kutime. Li diris ankaŭ, ke REU havas neniun statistikon pri la kvanto de UEA-membroj en Rusio, kaj ke la plejparto de la asociitaj membroj de REU ne konscias, ke ili estas ankaŭ asociitaj membroj de UEA. Kaj jen evidentiĝas, ke ankaŭ A. Lebedev ne scias pri la kvanto de la asociitaj membroj de REU inter la asociitaj membroj en UEA. Nur 1 persono (krom mi) dum la seminario konfesis, ke li estas individua membro de UEA.

Dum 45 minutoj mi sukcesis konatigi ĉ. dudekon da partoprenantoj pri proponoj de R. Corsetti, I. Fantom, C. Minnaja kaj I. Kossej pri la temo. (Vd. ilin sube.) Dum la pridiskutoj evidentiĝis, ke la plimulto de la publiko tre malbone imagas, pri kio ĝenerale

okupiĝas UEA. Do ne eblas facile decidi, kiel eblas plibonigi tion, kio estas apenaŭ konata. Necesas pli bone informi esperantistojn de Rusio pri UEA. Kaj verŝajne ne eblas fari tion tra REU. La tutan seminarion filmis barnaula esperantisto Mikaelo Ĥromov. Li promesis prezenti la pretan videofilmon post kelkaj monatoj.

Kaj jen estas aliaj proponoj, por kiuj ne restis tempo dum la seminario:

1. UEA ne povas agi sukcese, se neŭtrale, ĉar disvastigo de lingvoj ne estas neŭtrala politike. Necesas nur rimarki, kiom multajn monajn rimedojn kaj fortojn elspezas Anglio kun Usono, Francio, Rusio, Germanio, Ĉinio... por disvastigi siajn lingvojn en la mondo.
2. Estas granda krizo en la Akademio de Esperanto. Plejparto de ĝiaj membroj tute ne estas konataj al vasta E-publiko. Kaj eĉ pri tiuj, kiuj estas konataj, oni ne scias, pri kio ili okupiĝas. Kaj ĉu estas taŭgaj la kriterioj de elektoj al ĝi?...
3. En revuo "Esperanto" de UEA povas aperi nur artikoloj pri strikte limigitaj temoj, kaj tie ne eblas aperigi artikolojn pri pli gravaj temoj. Ĉu ĝiaj redaktoroj kapablas progresi?

Vladimir Minin

Kontribuajtoj por seminario "Kiel evoluigi kaj plibonigi la agadon de UEA" en kadre de "Novojarsko-2020" en Barnaulo (Rusio), la 3-an de januaro 2020

Principoj por evoluigi kaj plibonigi la agadon de UEA

En 1972, kiam mi fariĝis Estrarano pri informado de Brita Esperanto-Asocio mi antaŭenigis kelkajn principojn por la agado: 1. Oni diru la veron; 2. Estas en ordo por politike neŭtraleco asocio lobii parlamentanojn; 3. Oni ne provu persvadi al eminentuloj lerni la lingvon; 4. La devizo estu 'instruu Esperanton' anstataŭ 'lernu Esperanton'; 5. la rolo de la komitato estu servi la membrojn, por ebligi al ili plenumi tion kion ili volonte farus por antaŭenigi Esperanton, ne la inverso. La rezulto estis trioble la nombro da gazetaraj mencioj jare (ĝis 1985) en la tri jaroj. Tiutempe mi supozis, ke tiuj principoj estas sufiĉe evidentaj, sed estis granda laboro persvadi al ĉiuj membroj de la asocio akcepti ilin. Nuntempe preskaŭ neniu agas laŭ tiuj principoj en UEA.

Leviĝis poste plia principo: Neniu kiu malsimpatias kun la celo antaŭenigi Esperanton kaj la Esperantismon estu Estrarano. Nun, post historia esplorado, mi opinias, ke intrigo pro kiu mi ekzistis estis plene organizita. Estas en tiu rakonteto lecionoj ankaŭ por UEA.

Jen kelkaj principoj kiuj laŭ mi nun estas esencaj por reestabli UEA kiel sukcesan kaj progreseman organizaĵon:

1. Reestablu la celon de UEA

Malcerteco pri la celo garantias malsukceson. Membroj historie aliĝis por partopreni en la antaŭenigo de Esperanto (movado kaj lingvo), kaj el tiu fonto venis la heredaĵo de UEA. Necesas ke la Prezidanto klare reestablu tion kiel la celon de UEA. Verŝajne tio rezultus en minoritataj voĉoj de la Raŭmismoj, kiuj argumentos, ke tio ne estas eksplicite dirita en la statuto. Tamen ĝi estas subkomprenita, kaj ĉiukaze la Raŭmismoj ne bezonas UEA. Pluraj el ili jam diris al mi, ke ili ne bezonas la movadon. Tiun agadon devus gvidi Estrarano pri Informado, kunlaboro kun la Prezidanto kaj aliaj Estraranoj.

2. Ellaboru la internan ideon rilate al la hodiaŭa mondo

Necesas rilatigi la filozofion de Zamenhof al la hodiaŭa mondo. En lia tempo la homoj bone komprenis la rilaton inter lingvoj kaj militoj – temis ne nur pri komunikado sed ankaŭ pri genta identeco. Nuntempe ĉio kion diris Zamenhof tiurilate ankoraŭ validas, sed la ordinaraj homoj vidas la aferon alie, ĉar ili tro kredas la ŝtatan propagandon.

3. Agnosku la veron

Mensogado aŭ misrepresentado eble atingos kelkajn tujajn sukcesojn, sed ne longdaŭrajn, kaj ofte la homoj ĉiukaze travidus la propagandon. Ili respektos agnoskon de negatifaĵoj: se ili mem eniros la movadon kaj eltrovos ke la afero ne estas tia kian oni supozis, ili senreviĝos kaj elfalos. Ĉefe temas pri la nombro de Esperantistoj, la kresko aŭ malkresko, la relativa facileco de la lingvo. Sed nun mi scias, ke temas ankaŭ pri miskredigo ene de la movado, eĉ rilate al financoj. Necesas ke oni akceptu kritikojn fare de la publiko, kaj se la publiko pravos, la informisto turnu sin al la Estraro por tion raportu tiel ke ĝi agu laŭ tiuj kritikoj por ordigi aferojn.

4. Akceptu kritikojn

La ideo, ke la membroj kunlaboru kaj ne kritiku sur laŭ povas soni alloga, sed ĝi tutsimple ne eblas, ĉar bona kunlaboro devas inkluzivi akcepton kaj donon de kritikoj. 'Kunlaboro' sen akcepti kritikojn estas tio kion postulas demagogoj, kaj ĝenerale ili mem estas tre kritikemaj pri la membraro.

5. Ne provu persvadi al ĉiuj lerni Esperanton, sed subteni Esperanton

Al eminentuloj ĝenerale mankas tempo por lerni la lingvon, sed nur ono de tiu tempo estus bezonata por publike subteni la lingvon. La insisto, ke oni devas lerni la lingvon kvazaŭ incitan riton por subteni ĝin garantias, ke la movado restu eta. La devizo ne estu 'lernu Esperanton' sed 'instruu Esperanton'. Tiel en Britio en 1972-1974 mi gajnis pli ol duonon de la parlamentanoj, kaj la ĝenerala publiko fariĝis almenaŭ simpatia. Kaj cetere la homoj tiel pli facile venos al la ideo lerni Esperanton.

6. Ebligu al membroj fari siajn kontribuojn al disvastigo de Esperanto

La devizo estu 'Kiel la centro povas subteni ordinarajn membrojn, kaj aliĝintajn asociojn, en la antaŭenigo de Esperanto?', kaj ne 'Kiel la membroj povu helpi nin en la centro?'. BEA havis armeon da laborantoj, kun subteno de la centro, en la informado kaj instruado de Esperanto. Tion ne havas la nuntempa UEA, ĉar daŭre ĝi petas ke membroj helpu al la centro.

7. Ebligu kaj instigu al landaj asocioj ludi pozitivan rolon

Kion gajnas landa asocio per filiiĝo al UEA? Ĉu nur sidlokon ĉe la tablo de la Komitato de UEA ĉiujare en la Universalaj Kongresoj? En la UEA de Lapenna ni havis Internacian Gazetaran Servon, kiu provizis novaĵojn por ĵurnalistoj al la informaj fakoj de la landaj asocioj. Nuntempe ni havas nur la Gazetarajn Bultenojn kiuj celas la membrojn mem, kaj ne la eksteran mondon. Estu agado por kuraĝigi la landajn asociojn elekti Estraranojn pri Informado kiu respondecus pri la dissendo de novaĵoj al ĵurnalistoj de siaj respektivaj landoj. Ĉiuj membroj almenaŭ sciu kiu reprezentas ilin en UEA.

8. Vidi la rolon de UEA en la kunteksto de la monda socio

La problemoj de UEA speguliĝas en multaj asocioj en la Okcidentaj landoj, kaj certe en la anglalingvaj landoj ligitaj al la uson-brita Establaĵo. La problemoj kiun spertis Ivo Lapenna en la kvindekaj jaroj kaj la sepdekaj jaroj, kaj Gbeglo Koffi en la naŭdekaj jaroj, kaj mi mem en antaŭ jardeko similas al problemoj kiujn spertis Harold Wilson, Jeremy Corbyn, kaj multaj aliaj en diversaj organizaĵoj. Anstataŭ kaŝi tiujn aferojn ni preparolu ilin, kaj tiel ni gajnos la simpatian de multaj aktivistoj en diversaj sferoj.

9. Sekvu la tradiciajn valorojn de demokratio

Ordinaraj membroj insistu sekvi la konstitucion, kaj se estas mankoj en la konstitucio oni studu la regulojn por registritaj kompanioj. Oni ne lasu ĉion al la komitato. Resume: 1. Agu laŭ racio, ne laŭ aŭtoritato; 2. Neniam postulu pardonpeton, nek pardonpeti laŭ postulo; 3. Elektu homojn kiujn vi fidus, tamen kontrolu; 4. Rekonu kotŝmirajn kampanjojn, kaj aktive subtenu la viktimojn; 5. Neniam voĉdonu por propono se la proponinto evitas pravigi ĝin, ĉar eble li havas aliajn motivojn ol tiujn kiujn vi opinias evidentaj.

Ian Fantom, aktiva en BEA (Inc) kaj EAB de 1962 ĝis 2006. Individua Membro de UEA ekde 1962 (minus unu jaro). Dumviva membro de EAB, sed rezignis Fratulecon de EAB en 2004.

Kiel plibonigi agadon de UEA

Por sugesti plibonigojn de la agado de UEA oni devas firme fiksiĝi ajncelojn. La ofte renkontata plata kaj senemocia –disvastigo de Esperanto”, se ne kunigata al la interna ideo de –paco kaj justeco inter ĉiuj popoloj” kaj al la same grava intelekta plialtigo de la membraro, riskas esti nur komerca celo pri pli malmultekosta komunikado, kvazaŭ teknika plirapidigo de telefona lineo. Ĝi ja povus utili kaj tial allogi, sed se tiu estus la ĉefa celo, sufiĉus forte apogi la disvastigon de etna lingvo kiu jam deziras, kaj parte sukcesas, roli kiel internacia komunikilo, nenio pli. Kiam oni celas disvastigon de varo, oni montras kiel malbone funkcias potenciala aĉetonto sen ĝi, aŭ, prefere, kiel pli bone li funkcius kun ĝi. Sed la forto de Esperanto ne estas nur teknika, sed ideologia.

Inter la kaŭzoj kiuj blindigas homojn pri la bonaj ecoj de UEA estas ĝia daŭra malamikeco kontraŭ aliaj esperantistaj organizaĵoj. Ili ne estas konkurencaj firmaoj volantaj akapari al si plian areon de merkato deprenante ĝin de UEA, sed establoj kiuj indikas plibonigendajn aspektojn de UEA, kiujn estus oportune aŭskulti, anstataŭ malatenti aŭ eĉ ostracisme silentigi. Ne plu kongruas kun la nuna tempo, kiam individueco kaj sendependeco elstaras, la slogano –nueco estas forto”, perfekte taŭga kiam ĝi esti lanĉita kaj priinsistata, necesas nun konsideri ne propran forton sed propran buntan: –diverseco estas riĉo”, slogano iel paŭsanta tiun de la Eŭropa Unio (ne ja senkaŭze laŭreato de la Nobel-pac-premio) –in varietate concordia”. Agnoski, ke, ekzemple, Kultura Centro Esperantista organizas plurfoje jare altnivelajn renkontiĝojn, do ke ĝi estas registrinda en la kalendaro de la eventoj kaj plene reprezentinda en la UK-a –movada foiro” (anstataŭ esti prisilentata kaj rifuzata) helpus al la kompreno, ke UEA profitas ankaŭ el la alidevenaj sukcesoj. Estus oportune forte agnoski, ke la Esperanta PEN-centro, neniam menciata en la UEA-organo, estas altprestiga membro de la Internacia PEN, kiuj anstataŭas neekzistantan agentejon de UNESCO pri verkado.

La servoj de UEA, kiel la UK, proponindaj al ĉiuj, aspektas tro multekostaj por neindividuaj membroj. Individuan membrecon pagas personoj kiuj kundividigas statutajn celojn; pagi la UK-kotizon kun la aldono de sumo por kvazaŭa membreco al personoj kiuj deziras ĝui nur la UK-ajn servojn aspektas trude.

La Esperanta kulturo ligita al la lingvo estas grava parto de nia popolo/komunumo/grupo; tamen la KER-ekzamenoj agnoskataj (kaj patronataj) de UEA, atingas nur nivelon C-1 de la Eŭropa Referenc-Kadro; kial UEA ne aspiru ankaŭ al nivelo C-2, kiu entenas ankaŭ elementojn de nia kulturo, kiel jam faras Kultura Centro Esperantista, komisie de la Esperanta Civito? Certe estas personoj, kiuj ja ŝatus atingi tiun nivelon kaj do devas serĉi ĝin ekster UEA.

UEA estas universala; ju pli forte ĝi konscias, ke ĝi devas labori amike al aliaj kiuj kontribuas al la bunteco kaj riĉeco de la Esperanto-mondo, des pli forte ĝi konvinkus pri la valoro de Esperanto.

Carlo Minnaja – DM membro de UEA, HM de la Itala E-Federacio

Kiel evoluigi kaj plibonigi la agadon de UEA

Mi pensas, ke por evoluigi kaj plibonigi la agadon de UEA oni devas fari unu malsimplan aferon.

* la membroj de UEA devas decidi ke la plej bezonata tasko en nia movado estas refariĝi movado, alivorte fari tion, kion faris nia movado en la komencaj jaroj; disvastigi la lingvon kaj la ideojn kunligitajn kun ĝi. Sed en la moderna mondo neniu plu interesiĝas pri idealaj valoroj, same paco kaj egaleco kaj progreso estas aferoj, pri kiuj homoj ne plu interesiĝas. Tion diras tiuj, kiuj ne volas, ke la civitanoj interesiĝu pri tio, kaj tion disvastigas iliaj dungitoj, la ĵurnalistoj. Sed la esperantistoj scias, ke hodiaŭ pli ol antaŭ unu jarcento aŭ almenaŭ samgrade kiel tiam niaj ideoj estas bezonataj.

Temas pri malsimpla agado sed kun revoluciaj sekvoj, kiuj povus redoni al UEA iun rolon ĉe la neesperantista mondo, iun signifon, kiu perdiĝis. Ne estas mistero, ke nuntempe UEA ĉefe interesiĝas pri la organizado de la Esperanto-mondo kaj pri la vendado al ĝi de servoj aŭ aĵoj, nenio por asocio, kiu celas rilati al UN kaj Unesko kaj kredigi, ke ĝi kontribuas al la progreso de la homaro.

* Jam nun la kotizoj kaj la alia mono, kiun UEA sukcesas elsuĉi el la esperantista merkato estas nesufiĉa por vivteni ĝin, do, kiel ne tansiri al alia sistemo: petado de mono ĉe la progresema parto de la homaro por realigi projektojn, kiuj povus vere progresigi la mondon [lingvaj rajtoj, paco, klerigo en gepatraj lingvoj]

* por fari tion, oni devos apogiĝi je la aktivaj esperantistoj tra la mondo, je la aktivuloj, kiuj solaj havas la energion por fari ion. Do oni devas renversi la ideon, ke la estraro kaj la komitato kaj la Centra Oficejo estas io grava, dum kiam la veraj agantoj tra la mondo estas nur fuŝuloj. Kunordigado de tiuj fortoj, do, landa agado devos fariĝi io grava en la movado.

Esence ni refariĝu movado kaj revenu al la vera mondo, rilate al kiu dum jardekoj ni aŭdis, ke Esperanto estas neŭtrala, kaj pro tio la ŝanĝo de direkto estas malfacila.

Renato Corsetti

Ukraina civitano (loĝanta en Germanio) Ivan Koscej proponas:

Enkonduki lernadon de Esperanto en lernejojn oficiale. Kaj ĉi tion enkonduki oficiale en la dokumentojn de UEA.

UEA anoncu, ke UK-oj unuavice okazu en la landoj kun oficiala lernado de Esperanto en la lernejoj. Por malgrandaj landoj tiu ĉi propono povus esti profitdona. En Hungario jam okazas oficiala lernado de Esperanto en la lernejoj, do proksima UK okazu tie plejble rapide.



KER-sesio en Moskvo

Karaj geamikoj! Instruistoj kaj memlernantoj!

La 20-an de junio okazos la Tutmonda KER-sesio, en Moskvo jam la 10-an fojon.

Estas malfermita registrado en la paĝaro www.edukado.net

Bonvolu aliĝi, registriĝi kaj prepariĝi al la skriba ekzameno en la niveloj B1, B2, C1.

Bonvenas ne nur moskvanoj, sed ankaŭ aliurbanoj.

Moskvo daŭre estas en la tria loko en la mondo laŭ nivelo de organizo.

Ni ne mallevu la torĉon!

Viajn demandojn aŭ helpon petu ĉe la organizantoj: Svetlana Smetanina svsmetanina@yandex.ru kaj

Irina Gonĉarova mirinda.strigo@gmail.com

Ekzamenoj

Protokolo №10: pri malmembrigo de la dumvivaj membroj de REU, kiuj supozeble estas jam forpasintaj

Protokolo №10 de la Estrara decido

Dato: Moskvo, 28.12.2019.

Voĉdonado: reta.

Voĉdonis: A. Lebedev, S. Smetanina, N. Gudskov, I. Gonĉarova, A. Mitin.

Tagordo / temo:

Pri malmembrigo de la dumvivaj membroj de REU, kiuj supozeble estas jam forpasintaj.

Rezulte de analizo de disponeblaj datumoj pri la dumvivaj membroj de REU estis rivelitaj kelkaj sufiĉe aĝaj personoj, informoj pri kiuj ĉe la Estraro de REU kaj en interreto estas malfreŝaj, kaj kun kiuj ne eblas operative kontakti pro manko de la kontaktaj retadreso kaj telefonoj. La Estraro supozas, ke tiuj personoj povis forpasi.

Decidoj:

I. Ekde la 1-a de januaro 2020 eksigi el la membroj de REU la jenajn personojn:

- 1) Gulnara Akimbaj ĥazi Ahmet (Kazaĥio);
- 2) Viljam Aleksejeviĉ Berdiŝev (Moskvo);
- 3) Larisa Ĉerenkova (Rjazana regiono);
- 4) Vladimir Gluŝik (Ukrainio);
- 5) Nikolaj Gnedaŝ (Krasnodara regiono);
- 6) Marina Vjaĉeslavovna Laskina (Tula regiono);
- 7) Vladimir Jakovleviĉ Lipec (Moskvo);
- 8) Nikolaj Nikolajeviĉ Miĥajlov (Leningrada regiono).

II. Se poste evidentiĝos, ke iu el la eksigitaj vivas, li/ŝi estos revenigita en la membrojn.

Rezultoj de la voĉdonado:


por: 5;

kontraŭ: 0;

sin detenis: 0.

Prezidanto de REU: A. Lebedev.

Vicprezidantoj de REU: S. Smetanina, N. Gudskov.



Januaro 2020 frapas per siaj ekstremoj – en la Eŭropa Rusio ĉefe pluvis kaj preskaŭ ne estis neĝo, sed rekompense en Siberio pri la neĝo naturo ne avaris

Financa raporto pri la jaro 2019

La raporto estis preparita de Aleksandr Lebedev la 25-an de januaro 2020.

Sumo en la kaso, restinta de la jaro 2018: 21 883,57 P

Enspezoj

Titolo	Sumo, P
Inviduaj kotizoj	12 750,00
Kotizoj de subtenantoj	2 500,00
Klubaj kotizoj	21 800,00
Donacoj	530,00
Valentin Seguru elpagas la ŝuldon...	5 000,00
Librovendado (broŝuroj de B. Kolker, 28 pecoj)	1 400,00
Aŭkcio dum Zamenhof-tago en Moskvo	500,00
Sume, P	44 480,00

Elspezoj

Titolo	Sumo, P	Dato
→ al Nikolao Gudskov por eldono de la nova broŝuro-lernilo de B. Kolker	20 680,00	20.05.2019 (transdonita 21000 P); 01.06.2019 (ricevita redono 320 P)
presado de afiŝoj por RET-2020 (50 ekzempleroj, A4, koloraj)	750,00	12.07.2019
Pripago de la domajno reu.ru ĝis 30.09.2020	890,00	01.08.2019
Elpagoj el REU-kontoj al membroj / laŭ komiso de membroj	1 000,00	02.09.2019
Farado de dankleteroj (detala raporto sekvapaĝe)	2 769,00	07.10.2019 kaj 12.11.2019
Premio por Dmitrij Timin (detaloj sekvapaĝe)	900,00	09.11.2019
Subvencio al MASI — parta (50%) pripago de ejo por tritaga ekspress-kurso de Esperanto	2 000,00	06.12.2019
Oficialaj leteroj por lingvaj festivaloj (Sankt-Peterburg kaj Vladikavkaz)	252,00	09.12.2019
Mondonaco de REU al la fonduso «Subteno de laboro pri la vortaro de B. Kondratjev»	4 060,00	15.12.2019
Premio al Esperantisto de la jaro 2019 — Mikaelo Bronŝtejn	5 000,00	18.01.2020
Sume, P	38 301,00	

Enspezoj – elspezoj = 6 179,00 P
 Restaĵo fine la jaro 2019: 28 062,57 P

Eksterkase: 300 € de B. Kolker — dume troviĝas ĉe Svetlana Smetanina. Planatas uzi por transportado de libraro de Mikaelo Ĉertilov en Moskvon.

Konto de REU ĉe UEA (reua-p): debeta saldo 131,48 €, valida ekde 20.08.2018 (dum 2019 ŝanĝoj ne estis).

Pli detalan raporton eblas trovi en la paĝaro en la parto «Dokumentoj» aŭ elŝuti laŭ la rekta ligilo:

http://reu.ru/prenu/reu_financoj_2019_raporto.xlsx

“Ponto” [Bulteno de REU (BdR)] estas oficiala informilo de la tutrusia socia organizaĵo “RUSIA ESPERANTISTA UNIO”

La revuon aŭtomate ricevas ĉiuj membroj de REU, ĉiuj ceteraj povas aboni ĝin ĉe la Estraro kontraŭ 250 r. jare.

“Ponto” atendas viajn lokajn, regionajn novaĵojn! Bonvolu sendi ilin al Nikolao Gudskov nikolao@yandex.ru aŭ (kaj) Svetlana Smetanina svsmetanina@yandex.ru

Estraro de Rusia Esperantista Unio